


**Bernard Golden**

**KOMPLETIGE  
AL LA  
LERNOLIBRO**



**Scienca Universitato  
„Lajos Kossuth”  
Debrecen, 1990**

Samtemaj verkoj de la sama aŭtoro en

- MARGENE DE LA LERNOLIBRO, Budapeŝt, Hungara Esperanto-Asocio, 1982,
- multaj numeroj de DEBRECENA BULTENO, Departementa Komitato Hajdú-Bihar de HEA,
- multegaj Esperanto-periodaĵoj de la mondo.

Eldonita kunlabore kun la Esperanto-periodaĵo Debrecena Bulteno (Debrecen, Pf. 217. H-4002).

Bernard GOLDEN: A tankönyv kiegészítéseként  
(Eszperantó nyelvhelyességi tanulmány)

KOSSUTH LAJOS TUDOMÁNYEGYETEM  
DEBRECEN, 1990

# ANTAŬPAROLO

La favora akcepto de la unua kolektaĵo de miaj artikoloj pri lingvaj demandoj (Marŝene de la Lernolibro, Hungara Esperanto-Asocio, 1982, Budapeŝto, 58 pĝ.) kuraĝigis min kunmeti materialon por dua libro. Ĝia amplekso estas preskaŭ duobla kun entute dudek kvin artikoloj. Same kiel en la unua broŝuro, pluraj temoj rilatas al lingvaj malfacilaĵoj, kiujn apertas hungare parolantaj lernantoj kaj uzantoj de Esperanto pro la fenomeno de interfero inter la du lingvoj.

La unua artikolo montras, kiel lingvaj eraroj estas troveblaj eĉ en beletra revuo, kaj starigas la demandon: kiu estas kvalifika senerarigi tekstojn destinitajn por publikigo? La sekva verko okulfrape substrekas, ke ne ĉiu esperantisto estas kompetenta entrepreni tiun taskon. Poste venas diskuto pri la funkcio de la litero "ĥ" en la nuntempa evoluanta Esperanto.

Gramatikaj malfacilaĵoj estas pritraktitaj en la sekvaj studaĵoj. Du reliefigas la problemon de la uzo de transitivaj kaj ne-transitivaj verboj, kiu ĝis nun ne ricevis sufiĉe da atento fare de gramatikistoj kaj instruantoj. Tri artikoloj estas dediĉitaj al alia universala kaj eterna stumbligilo, la akuzativa kazo, kiu jen ne estas uzata kiam bezonata, jen aperas, kiam ĝi estas superflua, eĉ erara.

Prepozicioj estas pritraktitaj en tri artikoloj: "trans" uzata kiel prefikso kun kaj sen senco de almovo; la prepozicio post la verbo "eskapi", kiam temas pri demovo; la misuzo de "en" kaj "sub" kun la verboj "mergi" kaj "mergiĝi". Ankoraŭ tri studaĵoj priskribas, kiel estas eble elekti la plej ĝustan inter diversaj formoj de la sama vorto. La internacia sufikso "-graf", kiu aperas en pluraj Esperantaj vortoj, estas semantike analizita por montri, ke ĝi ne ĉiam havas la saman signifon en Esperanto; rezulte de tio mankas simetrio en la vortformado.

Tri artikoloj koncernas alian fonton de erara lingvouzo, la tiel nomatajn falsajn amikojn, kiuj estas vortoj en Esperanto ne havantaj la saman signifon kiel similaj vortoj en etnolingvoj. La sekvaj verkoj temas pri diversaj aspektoj de lingvouzo kiel la formado de mallongigo por "doktorino", traduko de la angla faktermino processor en Esperanton, fuŝa stilo, kaj la uzo de slavismoj kaj

lätinismoj en Esperantaj tekstoj. La lastaj du artikoloj rilatas al la tuta lingvo: la estiĝo de "dialekto" aŭ variaĵo de Esperanto sur la tereno de la hungara lingvo, kaj la ofta provo reformi Esperanton por elimino de ĝiaj supersignitaj literoj.

La dudek kvin artikoloj estis publikigitaj dum periodo de unu jardeko en la sekvaj dudek du periodaĵoj.

Akademiaj Studoj (Kanado)

The Australian Esperantist (Aŭstralio)

Budapeŝta Informilo (Hungario)

Bulgara Esperantisto (Bulgario)

Die Regno (Nederlando)

L'Esperanto (Italio)

Filologo (Bulgario)

Heroldo de Esperanto (Hispanio)

Informilo pri la Instrua Laboro (Bulgario)

Kolektanto (Bulgario)

Komuna Esperanto-Gazeto (Nederlando)

Mezmara Stelo (Malto)

Nitra Informilo (Ĉeĥoslovakio)

Nov-Zelanda Esperantisto (Nov-Zelando)

Paco (Bulgario)

Pola Esperantisto (Pollando)

Revista Portuguesa de Esperanto (Portugaliao)

Sabadell Esperantista (Hispanio)

Stafeto (Belgio)

Svisa Esperanto-Revuo (Svislando)

Le Travailleur Espérantiste (Francio)

Yelo (Jugoslavio)

Ĉar tiom da dise aperintaj artikoloj estas malfacile akireblaj, la nuna libroforma publikigo estas pravigebla. Ĝi estos utila precipe al instruantoj de kursoj por progresantoj kaj ankaŭ al aliaj uzantoj de Esperanto, kiuj ankoraŭ ne ricevis instruon pri kelkaj temoj pritrakitaj en la verkoj. Pro tio, kiel la titolo indikas, ĝi kompletigas la lingvoscion skiritan per lernolibroj.

La aŭtoro

Veszprém, novembro 1989

## HEELĈERPEBLA FONTO DE ERAROJ

En la beletra revuo Fonto (n-ro 26, 1982, pĝ. 26) aperis letero de Jiří Kořínek, kiu, atentigante legantojn pri kelkaj lingvaj malĝustajtoj, kiujn li trovis en du antaŭaj numeroj de la revuo, pledas por pli zorga manuskripta kontrolado fare de la kontribuantoj aŭtoroj mem. Li asertas, ke "la aŭtoroj de la trovitaj eraroj estas plejparte lingvaj eruditoj...do /ili/ devus kontroli siajn verkitajtojn kaj liveri kontribuantojn lingve senriproĉajn." Mi ne samopinias kun la ĉefa beletristo. Atingi lingvan senriproĉeblecon en Esperanto estas eble nur por treege malmultaj uzantoj de la lingvo, ĉu ili estas eruditoj, ĉu Akademianoj, ĉu "eternaj gramatikistoj". Mi scias propraserte, ke aŭtoro de verko estas la plej malkompetenta persono por korekti sian manuskripton aŭ ties kompostitan presprovaĵon. Dum kelkmonata laboro en la Centra Oficejo de UEA, mi plenumis la taskon korekti presprovaĵojn, post kiam la aŭtoroj mem havis okezon tralegi ilin. Senescepte kaj ĉiam mi trovis erarojn, kiujn ili preteratentis. Unu verkinto eĉ ne vidis, ke lia individua nomo estis misliterita en la tuta teksto! Kiu legas kaj relegas sian propran verkon estas ĉiam tro proksima al ĝi. Jam sciante la enhavon, li tro rapide legas tutajn frazojn kaj alineojn, frande ĝuante ankoraŭfoje sian propran kreaĵon anstataŭ donante atenton al ĉiu vorto, litero, interpunkcio kaj supersigno. Cetere, li neniam kapablas forigi etnolingvismojn el sia verko, simple, ĉar tiaj esprimmanieroj ŝajnas tute naturaj al li. Bona korektisto devas tute ignori la enhavon de la verko antaŭ siaj okuloj. Krom posedi perfektan scion de Esperanto, manuskript-korektisto devas havi gepatran lingvon, kiu ne estas tiu de la aŭtoroj, kies verkojn li ĝustigas.

Ĉar mi kutime legas kun krajono en mano, mi sukcesis noti ne malmultajn diverstipajn erarojn en Fonto, kiu ne estis elsarkitaj fare de la redaktoro. Ne eblas listigi ĉiujn, do mi donos kelkajn ekzemplojn de la lingvaj misaĵoj aperintaj en n-roj 26 - 30. Mi ne pritraktos komposterarojn, ĉar atentema kaj inteligenta leganto facile rekonos kaj ĝustigos ilin.

1. Frazoj en verkoj de slavlingvaj aŭtoroj ofte lamas pro manko de la difina artikolo.

"Sekvantan tagon tuta familio kunĉatenmanĝas."

Ĉar la tago kaj la familio estas difinitaj - ne temas pri iu tago aŭ iu familio - oni devas skribi: "La sekvantan tagon la tuta familio kunĉatenmanĝas."

2. Jiří Koříněk donis plurajn ekzemplojn de la misuzo de transitivaj kaj retransitivaj verboj, kaj mi aldonas la sekvajn citaĵojn. Tiu ĉi speco de eraro estas tre ofta kaj rezultas el la neeble scii, laŭ la formo de la verbo, ĉu ĝi estas transitiva aŭ netransitiva.

"Neniu pagas...- legiĝas ankoraŭ en la anonco kaj jene daŭriĝis..."

La verbo "daŭri" estas netransitiva, do la sufikso "-iĝ" estas superflua. Oni diru: "daŭris".

"...la elektran lumon anstataŭigis fulmoj..."

En tiu ĉi citaĵo la transitiva sufikso "-ig" ne estas bezonata, ĉar la verbo "anstataŭi" mem estas transitiva.

3. La "po"-esprimo estas sendube unu el la plej malfacile lerneblaj gramatikaĵoj en Esperanto. Aŭ oni ne uzas ĝin, kiam ĝi estas bezonata, aŭ oni superflue metas ĝin en frazojn.

"Reverendoj, jen kien mi alvenas: po tri pokalojtoj ĉiu-vespere."

Laŭ la kunteksto, oni komprenas, ke Patro Gaucher trinkas tri pokalojn da alkoholaĵo ĉiun vesperon. Ĉar la vorto "ĉiu" aperas en la frazo, "po" estas redunda (1), kaj kontribuas nenion al la kompreno de la frazo.

4. Ankoraŭ unu malfacila gramatikaĵo en Esperanto estas la refleksivo.

"...kaj stepo komencis difuzi tiun apartan, nur ĝian propran odoron."

La "propra odoro" apartenas al la subjekto de la frazo, "stepo", do temas pri "sia" kaj ne "ĝia" propra odoro.

5. Por multaj aŭtoroj de literaturaĵoj en Fonto estas malfacile decidi, kiam estas bezonata adverba participo kaj kiam oni uzu adjektivan participon.

"Mi tuĝ rekonis ĝin laŭ signo sur mia mspo kaj la priskribo, en kiu estis menciita "ŝtona virino", starante ĉe ĝia supro."

La participo "starante" rilatas al la pozicio de ŝtona skulp-

taĵo kaj ne al la verbo "estis menciita", do la participa formo devas esti adjektiva, "staranta".

"Por Bonko estis klare, ke la maljunulo enlitiĝis fumanta sian pipon kaj sensente ekdormis."

Oni devas demandi: "Kiel la maljunulo enlitiĝis?" "Dum li fumis sian pipon" aŭ "fumante sian pipon" estas la respondo, do la participo tie ĉi rilatas al la verbo "enlitiĝis" kaj estas adverba, "fumante".

6. Pluraj ekzemploj de manko de akuzativa akordo troviĝas dise en la verkoj publikigitaj en Fonto.

"Sendube ĝi rememoris de la mateno la viron doninta manĝaĵon."

La adjektivo "doninta" devas akordi kaze kun la substantivo "viro", do ĝi devas esti "donintan".

"Li ricevis diplomon memorigante la faron kaj medalon el altkarata kro."

La adverba participo "memorigante" povas rilati nur al la subjekto de la frazo, "li", sed tio faras la frazon sensenca. Temas pri diplomo, kiu memorigas gravan faron, do la participo estu adjektiva kaj en la akuzativa kazo, "memorigantan".

7. Makulas la bonan stilon de kelkaj verkoj vortordo eble karakteriza de iu aŭ alia etnolingvo, sed tute ne konvena por Esperanto.

"Kiam ŝi en la gardero antaŭ la spegulo ĝustaranĝis la ŝalon, alkuris post ŝi la estrino de la internulejo..."

Oni devas dufoje legi la frazon, ĉar inter la subjekto, "ŝi", kaj la verbo, "ĝustaranĝis", troviĝas ses vortoj. Oni metu "ĝustaranĝis la ŝalon" tuj post "ŝi" kaj skribu poste "antaŭ la spegulo en la gardero".

"Tie pasaĝeroj kuris kun siaj tekruĉoj, vestitaj per vatjako kaj feltbotoj."

Jen strangaj tekruĉoj, kiuj surhavas jakojn kaj botojn! Kompreneble, temas pri la pasaĝeroj, do "vestitaj per vatjako kaj feltbotoj" devas tuj sekvi tiun substantivon.

8. La misuzo de vortoj rezultas jen el miskompreno de la formo kaj signifo de Esperantaj vortoj, jen el influo de la gepatra lingvo aŭ alia lingvo konata de la aŭtoro.

"Maria...fariĝis tie kompliciulino."

La Esperanta vorto estas "komplico", do la ina formo estas "komplicino".

"Brogite de l'tuttaga suno, mi aŭdis homon..."

"Brogi" signifas "brulvundi per tre varma likvaĵo", kaj tion la suno ne povas fari. La ĝusta verbo estas "bruligi".

"...oni vidas lin...vagi en la ĥoro dum kvin minutoj serĉante sian sidfakon..."

Temas pri verko tradukita el la franca lingvo, en kiu la vorto choeur signifas kaj "ĥoro" kaj "ĥorejo". En la kunteksto de la rakonto, la formo "ĥorejo" estas bezonata.

"Aliĝu al la movado 'SoSo - Senpaga Servico'."

"Ĉi estas memservico."

En Esperanto "servico" estas "tuto de tabla garnituro, destinita por manĝoj". Pro influo de la angla service, la aŭtoro misuzis ĝin en sia verko; la ĝusta vorto estas "servado".

Tia fuŝa lingvouzo, kiun mi ilustris per ekzemploj ŝerpitaj ne el kajeroj de komencantoj, sed el verkoj publikigitaj en literatura revuo, ne estas fenomeno de la nuntempo. Antaŭ sep jardekoj sur la paĝoj de la plej elstara beletra periodaĵo de tiu tempo, La Revuo, Émile Poirac plendis kontraŭ samspecaj eraroj aperantaj en literaturaj verkoj. Nun tiuj malĝustaĵoj elfluas el ankoraŭ unu fonto. Sed ne nur Fonto suferas pro la eternaj eraroj de la esperantistoj. Mi laboras super similaĵoj de la lingvouzo en Hungara Vivo kaj Monato.

Estas evidente, ke Jiří Kořínek donas senesperan konsilon, kiam li proponas, ke aŭtoroj mem kontrolu siajn verkojn kaj liveru ilin lingve senriproĉaj. Eĉ la rakonto "Anemonoj" (Fonto, n-ro 27, pĝ. 16-21), kiun li mem tradukis el la ĉeĥa lingvo, odoras je traduko kaj bezonas poluradon. Ordinaraĵoj esperantistaj verkantoj ne kapablas lingve ĝustigi siajn proprajn verkojn. Por plenumi tiun taskon estas bezonata la redakcia kunlaboro de speciale trejnitaj kaj spertaj homoj. Mi ne troigus, se mi dirus, ke en la tuta Esperantujo, oni povas nombri tiujn kompetentulojn per la fingroj de unu mano!

#### Glosa

redunda (lingvistiko, informadiko) - rilatanta al parto de teksto aŭ mesaĝo, kiu ne estas nepre bezonata por komprenado; superflua, pleonasma, balasta.



## KIEL NE ĜUSTIGI ERAROJN

Okaze de la publikigo de unu el miaj artikoloj, d-ro N el Budapeŝto, kiu aglokule legis la pecon, sendis al mi kelkajn rimarkojn - pli ĝuste korektaĵojn. Mi deziras ŝi-sube prikomenti ilin por montri, kiel oni ne provu senerarigi tekston en Esperanto. Jen la frazoj, kiujn d-ro N elektis.

1. "...mi elvagoniĝis ĉe la metrostacio de la 116-a strato."

D-ro N argumentas, ke anstataŭ "ĉe" oni devas diri "en". Nu, se oni pensas pri serio da metrostacioj formantaj la linion de la metroo, envagoniĝo kaj elvagoniĝo okazas ĉe tiuj punktoj, kie situas la stacioj. Komparu jenajn zamenhofajn ekzemplofrazojn ilustrantajn la difinon A-1 de "ĉe" en Plena Ilustrita Vortaro (PIV).

1. loĝi ĉe la strato N
2. ĉe la angulo de la strato ŝi haltis
3. tute ĉe la rando de la arbaro...

Sed se oni pensas pri la stacio mem kiel konstruaĵo, tiam oni povas diri "en la metrostacio", ĉar povas esti, ke post elvagoniĝo oni staras sur la kajo aŭ promenas al la elirejo en la metrostacio. En La Kancerkliniko (1980, n-ro 13) aperis mia artikolo titolita "Kiel instrui Esperanton al marsano: leciono pri prepozicio". En ĝi mi pritraktas la kaprican uzon de prepozicioj en frazoj ĉerpitaj el Budapeŝta Informilo. Mia celo en tiu verko estas montri, ke la uzo de prepozicioj en la "facila" lingvo Esperanto estas pli komplika ol kelkaj propagandistoj volas kredi.

2. "...mi piediris en la direkto al Riverside Drive."

Citante §190 de Plena Gramatiko (PG), d-ro N volas substitui "en la direkto de" aŭ "direkte al" al "en la direkto al". Sed li forgesis rigardi en la same aŭtoritata PIV, kie troviĝas jenaj zamenhofaj frazoj.

1. la avo kapsignis en la direkto al la spegulo
2. iru kaj rigardu en la direkto al la maro

La alternativa esprimo "direkte al" de PG estas tutsimple mallonga maniero diri la samon. Apogas la uzon de "al" G.J.Degenkamp en sia verko La Konsilanto pri la Esperanta Gramatiko. Sur pĝ. 17 oni po-

vas legi tiun ĉi frazon: "Ili biciklis en la direkto al Haarlem." Laŭ d-ro N, "en la direkto de" estas logika, ĉar oni demandas "en kies direkto?" Jes ja, ge oni tiel demandas, sed pli logike estas analizi la frazon jene: "Ili biciklis kien?" Al Haarlem, laŭ imago linio, kiu kondukis al determinita punkto, t.e. en la direkto al Haarlem.

3. "...mi serĉis adreson skribitan sur paperslipo en mia mano."

D-ro N ne komprenis, kie mi serĉis la adreson. Laŭ PIV "adreso" estas "preciza loĝloko de persono, firmo ks., difinita per strato, urbo ktp." Nu, sur la paperslipo sinjoro skribis post sia nomo, la nomon de la strato kaj la numeron de la domo, kie troviĝas lia apartamento. Tiun adreson mi serĉis, unue legante la nomojn sur strattabuloj kaj poste rigardante la numerojn de la konstruaĵoj en la ĝusta strato. Tiun vesperon nebulo kovris la urbon kaj ĝi malfaciligis la serĉon, sed mi ne povis kompreni, kial d-ro N trovis nebula ankaŭ la frazon.

4. "Tiutempe mi jam ne estis daŭra loĝanto en tiu urbo, sed troviĝis en la metropolo nur provizore..."

Laŭ d-ro N oni devas uzi la pronomon "mi" antaŭ la verbo "troviĝis". Kontraŭan konsilon donas PG (§219, Rim.I) rilate la kompleksan frazon:

"En kunorditaj propozicioj oni ne devas ripeti la subjekton, se ĝi estas identa en la subpropozicioj:  
'Li eksaltis, sed falis kaj sternaĝis sur la tero.'"

Male, en suborditaj propozicioj oni devas ripeti la subjekton aŭ anstataŭigi ĝin per pronomo: "Paŭlo sciis, ke li vane atendas." Laŭ PIV "sed" estas kunorda konjunkcio, do mia frazo estas centprocente ĝusta. Hungaraj esperantistoj ofte eraras pri tiu ĉi punkto pro influo de la gepatra lingvo, kaj ellasas subjektojn en suborditaj propozicioj.

5. "Ne nur ilia esperantisteco kaj komuna familia nomo ligas tiujn ĉi du homojn; ambaŭ ankaŭ naskiĝis en la sama jaro: 1894."

D-ro N opinias, ke "ankaŭ" estas superflua en la dua propozicio. Mi uzis ĝin por doni ekvilibron al la du propozicioj: ne nur... (sed) ankaŭ... Cetere, "ankaŭ" ne ligiĝas nur al la sekva verbo

"naskiĝis", sed enkondukas sintagmon: "naskiĝis en la sama jaro". Alimaniere esprimite, la simetrio estas jena: ne nur esperantisteco kaj sama nomo; ankaŭ sama naskiĝjaro.

6. "Li ne nur administris ĝin, sed ankaŭ kontribuis literaturaĵojn...

D-ro N atentigas, ke "kontribui" laŭ PIV estas netransitiva verbo kaj pro tio oni devas diri "kontribui al". Prave! PIV ja signas "kontribui" per "ntr", sed estas necese esplori la aferon pli profunde. Plena Vortaro (PV), eldonita en 1934, signas la saman verbon per "x", kiu signifas, ke ĝi estas transitiva kaj netransitiva! Kio okazis inter 1934 kaj 1970, kiam aperis PIV? Kial decidis la redaktoro de PIV, Gaston Waringhien, forigi la "x" kaj klasifi "kontribui" kiel netransitivan verbon? Mia opinio, oni povas trovi la kialon en la denaska lingvo de la redaktoro, la franca. Contribuer à estas verbo uzata kun prepozicio signifanta "al" en Esperanto. Estas, do, logike, ke li tradukis la francan esprimon per "kontribui al". Tamen, la senco de "kontribui" permesas ankaŭ la uzon de rekta objekto, t.e. akuzativo, kiel en la angla lingvo: to contribute. Jen ekzemplo el la Esperanta-angla vortaro de M.C. Butler (1967).

1. kontribui artikolon al gazeto, eron al programo, monon al kaso

Li donas ekzemplon ankaŭ de la netransitiva uzo.

2. kontribui al diskuto, al la sukceso de

En PV troviĝas du ekzemplofrazoj, kiuj estis ellasitaj en PIV.

3. kontribui belan eron en la programo
4. kontribui artikolojn al gazeto

Ŝajnas, do, ke antaŭ 1970 "kontribui" estis kaj transitiva kaj netransitiva verbo. La transitiveco de "kontribui" estas apogata ankaŭ de la eminenta esperantologo kaj leksikografo, Eugen WUster. En sia Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana (1923) li registras "kontribui" kun "al io" kaj "ion". Li notas ankaŭ, ke ĝi estas transira verbo, kiu povas esti uzata absolute, t.e. sen komplemento.

7. "...mi ne devas detale pritrakti ĝin tie ĉi."

D-ro N opinias, ke "ne devas" signifas laŭ zamenhofs uzo "ne

estas permesate". Jen du zamenhofaj frazoj cititaj en PIV, kiuj similas al mia.

1. se ni ne trovas pli bonan esprimon, tio ne devas nin ĉagreni

2. ni ne devas miri, ke tia sistemo ne povis trovi amikojn

Mi ne trovas en tiuj du frazoj la nocion "ne estas permesate". La senco estas, ke ne estas necese, ke io okazu, ĝi ne nepre okazos. Por esprimi "ne estas permesate", oni diru "devas ne". La sekvaj du frazoj ilustras la nuancon.

3. Ŝoforo ne devas trinki kafon, antaŭ ol li stiras aŭton (sed li povas fari tion, se li volas).

4. Ŝoforo devas ne trinki alkoholaĵon, antaŭ ol li stiras aŭton (ne estas permesate al li fari tion).

Esperable, d-ro N nun pli bone komprenas la enhavon de mia artikolo. Se li persistos en harfendado estontece, estas konsilinde, ke li pli zorge akriĝu sian klingon, por ke li ne tranĉvundu la proprajn fingrojn.

## ĈU VI ĤOADAS EN ESPERANTO ?

Legu la sekvajn frazojn.

1. La Ĥina monarĥo veladis tra la lago en sia jaĥto.
2. Tiu Ĥemisto okupiĝas pri la uzo de Ĥromo en la nuntempa teĥnologio.
3. Ĥarakteriza trajto de la nuntempa arĥitekturo estas la ferbetona konstruata teĥniko.

Tiuj frazoj aspektas iom strange pro la troa ofteco de la litero Ĥo. Kvankam Ĥiu vorto literita per ĝi estis uzata fare de esperantistoj, kelkaj eĥ de d-ro Zamenhof mem, dum la evoluado de nia lingvo, la Ĥoado iom post iom reduktiĝis kaj estis anstataŭigita per la koado sŭ per alia ŝanĝo en la formo de la Ĥo-vorto. Tamen, ankoraŭ estas kelkaj esperantistoj, kiuj obstine kaj obsedite rifuzas konstati tiun tendencon kaj preferas superŝuti siajn tekstojn per ĥapelitaj Ĥo-literoj. La rezultanta Ĥoado odoras je arĥaĥkeco. Jen kelkaj ekzemploj.

Kvankam la gentnomo "Ĥino" estis uzata de Zamenhof, antaŭ longe "Ĥino" estis substituĥita al ĝi, kaj la koncerna popolo mem uzas tiun formon hodiaŭ. Malgraŭ tio, Sciencia Revuo ĝis antaŭ nelonge insistis pri la formo "Ĥino". Eĥ kiam Zamenhof elektis ko-formon de vorto, ekzemple "kromo", la metalo, kelkaj lingvaj superpuristoj opinias, ke estas pli ĝuste skribi "Ĥromo", kaj tiu formo aperas en Poŝatlaso de la Mondo, eldonita en 1971! Eĥ pli bizara vorto estas "Ĥarakterizi", kiun oni povas legi en artikolo verkita de Josef Kavka, la ĥefredaktoro de Sciencia Revuo. En 1888 parenca vorto "Ĥaraktero", aperis en rakonto, kiun Zamenhof tradukis. Sed jam en 1889 li registris ĝin kiel "karaktero" en sia plena rusa-Esperanta vortaro. Pro tio, estas neniel pravigebla la nuna uzo de "Ĥarakterizi".

Kiu serĥas ekspertan opinion pri tiu ĥi demando, konsultu la 10-an oficialan bultenon de la Akademio de Esperanto (Aktoj II), eldonitan en 1975. El tiu aŭtoritata verko estas sankciita - eĥ oficialigita - la paralela uzado de Ĥo- kaj ko-vortoj. La moderna prefero al koado estas spegulita ankaŭ en Plena Ilustrita Vortaro (PIV - 1970), kiu plurloke resendas legantojn serĥantajn Ĥo-vortojn al formoj literitaj per ko: teĥniko = tekniko; Ĥemio = kemio, arĥitekturo = arkitekturo, Ĥaribdo = Karibda.

Kiu ankoraŭ ne estas konvinkita pri la arkaikeco de ĥo-vortoj, legu jenajn opiniojn cititajn el verkoj de la aŭtoro de Esperanto. Zamenhof skribis, ke "ĥ" estas litero "tre malofte renkontata kaj baldaŭ ĉespereble tute malaperonta..." Pri traktante reformojn en Esperanto, li diris, ke "la sono "ĥ" estos tute elĵetata", ĉar ĝi estas "por tre multaj personoj tro malfacile elparolebla...". Zamenhof plue konsilis, ke "en ĉiuj nove enkondukotaj vortoj oni devas eviti la sonon "ĥ" kaj uzi anstataŭ ĝi la sonon "k".

La ĉiam malpli ofte uzo de ĥo estas eble la sola daŭre evoluanta ŝanĝo efikanta sur la ortografion de Esperanto. La esperantologo Ernest Drezen rimarkis tion antaŭ duonjarcento, kiam "monarĥo" kaj "psikologio" jam estis anstataŭigitaj per "monarko" kaj "psikologio". Antaŭ pli ol 50 jaroj, la bibliografo Petro Stojan prognostis la formalaperon de ĥo en la periodo 1950-1960. Estas evidente, ke la profetaĵo de Stojan estis iom antaŭtempa. Ĥo ankoraŭ troviĝas en la Esperanta alfabeto, kvankam ĝi estas la plej malofte uzata litero.

Analizantoj de la Esperanta fonetiko emfazas, ke la kadukiĝo de ĥo rezultas de ĝia malfacila prononco. Couturat kaj Leau en 1910 argumentis, ke ĥo estas malfacile prononcebla por ĉiuj romanidaj popoloj krom la hispanoj kaj pro tio ĝi estas kondamnita malaperi. Edmond Privat apogis la opinion de la du eminentaj idistoj:

"La litero ĥ pli kaj pli malaperis: teĥnika fariĝis teknika, ĥemio - kemio, ĥina - ĉina ktp. La kaŭzo de tiuj evoluetoj estas plej ofte la ideo al pli facila elparolo. La komenca lingvo estis ĉefe skriba. Poste la parola uzado regis, kiel en vivanta lingvo, kaj ĝi nature influis laŭ konataj leĝoj."

(Historio de la Lingvo Esperanto, 1927, pĝ. 188)

Kion vi opinias? Ĉu oni ankoraŭ ĥodas en Esperanto en 2087, okaze de la ducentjara datreveno de ĝia estiĝo?

## LA TRANSITIVECO DE VERBOJ EN ESPERANTO

Leginte la artikolon de W.Krikke pri la akuzativo en Esperanto (Dia Regno, 1978/3, pĝ. 2066), mi tiris la konkludon, ke li apartenas al la "Deksesa Skolo" de esperantistaj gramatikistoj, nome tiuj, kiuj volas kredigi, ke Esperanto estas tiel facila, ke estas eble rezumi la tutan gramatikon per nur 16 reguloj. S-ro Krikke ja prezentis modelan lecionon por instrui la akuzativan kazon en Esperanto, sed temas pri nur unu kazo de tiu kazo: la uzo de la akuzativo por esprimi la rektan objekton de transitiva verbo.

Eĉ se la lernantoj de s-ro Krikke sukcesos enkapigi la regulon por tiu uzo, ili neniam povas kompreni la aliajn funkciojn de la akuzativo en la sekva ekzemplodona frazo, kiun mi citas el verko de G.Waringhien.

"Tutan horon la hundo, la voston supren, postkuris en ĉiujn ĉambrojn ŝian ducent frankojn kostintan kateton kaj ĝin tri fojojn ekmordis." (Lingvo kaj Vivo, pĝ. 163)

Jes ja, tia frazo ne estas ofta nek en la parola lingvo nek en la skriba lingvo. Tamen, ĝi prezentas, krom la akuzativo de la rekta objekto, kvin aliajn uzojn. Mi estas tre scivola, kiel s-ro Krikke "plejeble simple kaj malkomplike" klarigas tiujn ĉi gramatikaĵojn. Kaj eĉ se li sukcesas formuli klarajn regulojn por la akuzativo de almovo, la akuzativo kun adjektoj de tempopunkto, daŭro, mezuro kaj maniero/stato, kaj ankaŭ malkomplikas la uzon de la akuzativo en elipsaj konstruoj, la etimologia figuro kaj la interpozitivo, li ankoraŭ ne povas antaŭĝoji. M.C.Butler en sia Klasifiko de Esperantaj Temoj listigas proksimume 60 punktojn rilate la akuzativon en Esperanto - tiklajn kaj subtilajn punktojn, kiujn eĉ la plej ĝisdataj kaj ampleksaj Esperanto-lernolibroj ne tuŝas. Oni nomu tion harfendado, se oni volas, sed kiu serioze kaj objektive ekzamenas Esperanton, ne povas ne konstati, ke la funkcioj de la n-finaĵo estas multe pli vastaj en Esperanto, ol tiuj de la tradicia akuzativa kazo en etnaj lingvoj.

Kvankam la primajstrado de la akuzativo estas malfacile venkebla obstaklo por multaj lernantoj de Esperanto, mi opinias, ke ĝi ne estas la sola malfacila aspekto de la gramatiko de Esperanto, kiu bezonas specialan traktadon. Lastatempe mi esploris alian fenome-

non, kiu eble estas pli insidema stumbligilo ol la n-finaĵo. Temas pri la transitiveco de verboj. Mi jam registris erarojn ĉi-rilate en vortaroj, en libroj verkitaj de instruistoj kaj lingvistoj kaj ankaŭ en prestiĝaj periodaĵoj. Neniu estas imuna kontraŭ la risko misuzi transitivajn kaj netransitivajn verbojn — nek komencantoj nek progresintoj nek akademianoj! Tute ne gravas, ĉu en la gepatra lingvo de la uzanto estas markita la transitiveco de verboj aŭ ne. Por konvinki dubemulojn pri miaj asertoj, mi prezentos ĉi-sube parton de mia rikolto de misaĵoj. Interkrampe troviĝas la ĝustaj formoj de la eraraj substrekitaj verboj.

- A. Landa revuo: Voĉo, eldonita en Jugoslavio  
"Kun la dekstra mano li haltas la bridojn..." (haltigas)  
"Sed la du eminentaj verkoj en io grave diferenciĝas." (diferencas)  
"Tio estas sanaj, junaj virinoj kies mamoj mature balancas sub la someraj roboj." (balanciĝas)
- B. Internaciaj periodaĵoj  
Heroldo de Esperanto: "Kio inklinis vin elekti ĝuste ĉi temon..." (inklinigis)  
Norda Prismo: "La diskutoj rezultis ne nur negativajojn." (rezultigis)  
Scienca Revuo: "En la romaj legioj svarmas soldatoj rekrutigi-taj el la balkanaj popoloj." (rekrutitaj)
- C. Faklibro pri la instruado de Esperanto: Metodiko de la Esperanto-Instruado:  
"...la neĝbulo, kiu rapidege pligrandiĝas rulanta sur la deklivo." (ruliĝanta)  
"Ĉi (la moderna scienco) evolugis tiagrade..." (evoluis)  
"Ni esperu, ke baldaŭ komencu la kvara periodo." (komenciĝu)
- Ĉ. Fakrevuo pri esperantologio: Esperantologiaj Kajeroj 1  
"Ofte okazas, ke al la sama verbo samtempe rilatiĝas subkomponentoj kaj rekte kaj nerekte..." (rilatas)  
"ŝprucas la akvon en la vizaĝon" (ŝprucigas)  
"Ĉiuj el ni respeguligas alian flankon de la sama interrilato." (respegulas)
- D. Vortaro: Plena Ilustrita Vortaro  
Meĉujo: "Malgranda ujo, kun oleo, en kiu trempas meĉo, uzita



por lumigado." (trempiĝas)

Dasimetro: "Aparato servanta por indiki la emergiĝon de korpoj en gasoj." (emergiĝon)

E. Akademianoj

Roger Bernard: Raymond Schwartz, lia vivo kaj verkaro.

"...ĉiuj indaj esperantistoj rangas lin inter la plej renomaj..." (rangigas)

William Auld: Epifanio

"Cezario, vi certe tre rapide avanciĝos..." (avanco)

Kálmán Kalocsay: Lingvo, Stilo, Formo

"...la poeto abortas la rimon..." (abortigas)

Rüdiger Eicholz: Cirkulero TC 76 1

"...mi pli forte pezos la poentojn disdonitajn de niaj spertuloj." (pezigos)

Marjorie Boulton: Okuloj

"...la malgranda objekto komencis iom hipnoti lin..." (hipnotigi aŭ hipnotizi)

Mi povas daŭrigi la liston de eraroj, sed mi riskas tedi la legantojn. Estas evidente, ke kaj lernantoj kaj spertuloj devas daŭre streĉi la cerbon por ĝuste uzi tiujn verbojn en Esperanto, kiuj en etnaj lingvoj estas diversmaniere uzataj. La Esperanto-verbsistemo havas markilojn por tensoj (-as, -is, -os), modoj (-us, -u) kaj modaloj (-i, -nt), sed ne estas iu markilo por bazaj verbaj radikoj (morfemoj), kiuj indikas, ĉu ili estas transitivaj aŭ netransitivaj. Se oni jam scias la econ de iu verbo, tiam oni povas netransitivigi transitivan verbon per la sufikso -iĝ kaj transitivigi netransitivan verbon per la sufikso -ig laŭ jenaj ekzemploj: nomi (tr) - nomiĝi (ntr); sidi (ntr) - sidigi (tr).

En la frua historio de Esperanto, kiam ĝi ankoraŭ estis en la stadio de la pra-Esperanto de 1881-1882, Zamenhof eksperimentis per internaj ŝanĝoj en kelkaj verboj por esprimi nuancojn de signifo. La klasika Esperanto de 1887 heredis nur unu el tiuj duoblaĵoj, kiuj odoras je volapukismo: pezi (ntr) kaj pesi (tr). La etimo de ambaŭ formoj estas la franca verbo peser, kiu povas esti uzata transitive kaj netransitive. Pro la malfacileco memori, kiu verbo de la Esperanta vortparo estas transitiva kaj kiu estas netransitiva, Zamenhof forlasis tiun metodon indiki la transitivecon de verboj. Restas en la lingvo nur la duoblaĵo "pezi/pesi" kiel ĝena fa-

Ligilo por multnombraj lernantoj - sed ne nur lernantoj. Kiel estas eble klarigi, ke post kvar eldonoj, la Esperanta-hungara vortaro redaktita de Alfonz Pechan ankoraŭ registras "pezi" kiel transitivan verbon?

Kompare kun la pritraktado de la uzo de la akuzativo, aŭ la teoriado pri la difina artikolo, aŭ la disputoj pri la aspekta karaktero de pasivaj kunmetitaj verboj, la problemo de transitiveco ŝajne estas forgesita aŭ silentigita; almenaŭ ĝis nun mi ne trovis profundan analizon pri ĝi.

Kio estas la kialo de tiom da gravaj eraroj fare de homoj, kiuj alimaniere bone regas Esperanton? Sendube, unu klarigo estas, ke en iliaj gepatraj lingvoj la sama verbformo povas esti uzata transitive kaj netransitive, kaj la preciza signifo venas el la kunteksto. Oni komparu la verbojn en la ĉi-suba tabelo.

Esperanto	Angla	Franca	Germana	Rusa	Hungara
<u>komenci</u>	} to begin	<u>commencer</u>	<u>anfangen</u>	{ <u>naĉinatj</u>	<u>kezd</u>
<u>komenciĝi</u>					{ <u>naĉinatjĝja</u>

Sed tio ne povas esti la tuta klarigo, ĉar kvankam troviĝas markiloj en iuj etnaj lingvoj por diferencigi transitivajn verbojn disde netransitivaj verboj, tamen eraroj persistas. Laŭ d-ro Szerdahelyi, la hungara verbsistemo havas 16 markilojn servantajn por tiu celo: malgraŭ tio, mi trovas, ke hungaraj esperantistoj faras la samajn erarojn kiel alilingvuloj.

Kien, do, turnu sin esperantisto, kiu volas eviti erarojn kaj lerni la ĝustan uzon de verboj? Plena Gramatiko konsilas jene:

"...oni rigardu la Plenan Vortaron pri la transitiveco aŭ netransitiveco de certa verbo." (3-a eldono, § 178)

Konsultante Plena Vortaro oni trovas, ke verboj estas signitaj kiel transitivaj, netransitivaj aŭ per "x", kiu signifas, ke ili povas esti transitivaj kaj netransitivaj. Tubero en la afero estiĝas, kiam oni konsultas la pli ĝisdatan Plena Ilustrita Vortaro. En tiu ĉi vortaro la signo "x" ne estas uzata. En sia antaŭparolo (pĝ. xiii), la ĉefredaktoro, G. Waringhien, klarigas, ke la klasifado de verboj inter transitivaj kaj netransitivaj prezentas iajn malfacilaĵojn pro la elasteco de la uzado de la akuzativo en Esperanto. Li preferas analizi la verbon por trovi, ĉu unu senco donas transitivan, alia netransitivan karakteron al la radikoj. Lia opinio, la regulo, ke la sama verbo ne povas esti samtempe transitiva kaj netransitiva,

estas malĝuste formulita, ĉar la verbo ne konservas precize la saman senco. En la kazo de "komenci" kaj "komenciĝi", temas pri la sama procezo, do diversaj formoj estas bezonataj. Male, en "li batas sian hundon" kaj "la tamburoj batas" temas pri du malsamaj nocioj. Sed ne nur la verbo "bati" havas tiun ĉi dusencecon. Oni ofte pridiskutas "fumi": ĉu ĝi estas transitiva aŭ netransitiva? Komparu tiujn ĉi zamenhofajn ekzemplojn:

"ĉiuj kamentuboj fumis..." - netransitiva  
"fumi cigaron" - transitiva

En Lingvo kaj Vivo (pĝ. 76) Waringhien pritraktas tiun verbon detale, rezonante, ke eble la senco, kiun Zamenhof donis al "fumi" estis nur "produkti fumon", do en "la Dia kolero fumas" kaj "mi fumas per pipo" la senco estas evidente netransitiva. Se oni aplikas la 14-an regulon de la zamenhofa "Plena Gramatiko" kaj anstataŭigas la prepozicion "per" per la akuzativo, la frazo aspektas jene: "mi fumas pipon", kaj ĉiuj diros, ke "fumi" estas transitiva verbo.

Tiu rezonado estas subtilado, kaj ne estas praktike tiel detale analizi ĉiun verbon, kiu estigas dubon. Oni devas konsulti vortarojn aŭ havi aliajn helpilojn, sed bedaŭrinde, ne ĉiuj vortaroj akordas. Utila libreto ekzistas por france parolantoj: Falsaj amikoj en Esperanto verkita de Roger Bernard kaj André Ribot. Ĝi enhavas liston de la plej oftaj verboj, kiuj kaŭzas problemojn por franclingvuloj. Ĉiu verbo estas tradukita franclingven, kaj ilustra frazo sekvas ĝin. Estatus tre utile publikigi similajn verkojn por parolantoj de aliaj lingvoj. Cetere, oni ne povas tro insisti, ke ĉiu instruanto kaj ĉiu verkanto de lerniloj speciale atentu tiun ĉi problemon. Leksikografoj devas klare indiki la transitivecon kaj netransitivecon de verboj en siaj vortaroj, ĉefe kiam la naci-lingva uzado povas konfuzi la lernanton. Fine, esperantologoj havas gravan taskon profunde studi la fenomenon kaj sekvi ties evoluon en la lingvo, por povi formuli klarajn kaj konsekvencajn principojn por la uzo de verboj en Esperanto. Manke de tio, daŭre aŭdiĝos plendoj, ke Esperanto ja estas facila lingvo, sed ĝi havas gramatikajn malfacilaĵojn.

## "ŜPRUCI" - ĈU TRANSITIVA AŬ NETRANSITIVA ?

Sur la du lastaj kovrilpaĝoj de Budapeŝta Informilo (julio 1979) aperas reklamo pri frotstukaĵo, kies teknika lingvo forte odoras je tradukado. Frapas la atenton ankaŭ la nekonsekvencu uzo de la radiko "ŝpruc-" en jenaj frazeroj.

- a. "Por ŝpruci ĝin estas uzeblaj aparatoj..."
- b. "La surŝprucita materialo estas forlavebla..."
- c. "Antaŭ ol komenci la ŝprucadon..."
- ĉ. "La optimuma funkcia premo por ŝprucigado..."

La tradukinto hezitas inter la uzo jen de "ŝpruc-", jen de "ŝprucig-", kvazaŭ li ne komprenus la diferencon. Tiu ĉi ekzemplo de fuŝa lingvouzo en teknika kunteksto estas kondamninda. Bedaŭrinde, ĝi ne estas izolita aŭ unika kazo de la misuzo de "ŝpruc-". Jen ekzemplo ĉerpita el laboraĵo temanta ĝuste pri verboj en Esperanto, verkita de studento ĉe la Filologisciencia Fakultato de Universitato Loránd Eötvös en Budapeŝto: "ŝprucas la akvon en la vizaĝon" kaj "ŝprucas la vizaĝon per akvo" (Esperantologiaj Kajeroj 1, 1976). Ĉar tie ĉi la kunteksto estas lingvistika kaj esperantologia, la eraro estas netolerenda.

Laŭ Plena Ilustrita Vortaro (PIV) "ŝpruc-" estas netr Transitiva verba radiko; tio signifas, ke "ĝi esprimas agon, kiu koncernas nur la subjekton kaj ne pasas al la objekto". Jen du ekzemploj: "tute apude ŝprucis fonto" kaj "larmoj ŝprucis el liaj okuloj". Oni ne povas diri, ke "fonto ŝprucis akvon"; por esprimi tion, estas necese transitivigi la verbon per la sufikso "-ig-": "fonto ŝprucigis akvon". Pro tio la uzo de "ŝpruci", "surŝprucita" kaj "ŝprucadon" en la unuaj tri ekzemploj el la reklamteksto estas erara; estas bezonataj la transitivaj formoj "ŝprucigi", "surŝprucigita" kaj "ŝprucigadon". Nur la uzo de "ŝprucigado" en frazero (d) estas ĝusta. Sekve, la aparato, kiu ŝprucigas tiun morteron estas ŝprucigilo. Ankaŭ en la prilingva laboraĵo la verbo devas havi la transitivan sufikson "-ig-".

Estas konsilinde, ke verkantoj de Esperantaj lernolibroj kaj vortaroj prezentu pli detalajn klarigojn rilate la transitivecon de verboj por averti lernantojn pri tiu granda malfacilaĵo en Esperanto, kiu ne estas sufiĉe ofte pritraktita, kompare kun aliaj cerbumigaj gramatikaĵoj en la Internacia Lingvo.

# LA PROBLEMO DE AKUZATIVA AKORDO

Estas ĝenerale konstatate, ke la uzo de la akuzativo estas unu el la plej grandaj malfacilaĵoj por ĉiuj lernantoj de Esperanto. Sed ne nur komencantoj pekas ĉi-rilate. Kelkfoje ankaŭ spertaj uzantoj de la Internacia Lingvo stumblas ĉe tiu gramatikaĵo, kies diversaj reguloj ne ĉiam estas sufiĉe profunde lernitaj. La plej multenombraj eraroj estas faritaj en la parola lingvo, ĉar oni ne havas tempon pensi pri gramatikaj konstruoj. La sekva nivelo de erarofteco estas ilustrita en leteroj. Kvankam oni ja havas tempon pensi pli zorge pri la lingvouzo kaj eĉ skribi malneton de la leterero, ne ĉiuj esperantistoj faras tion. Kelkfoje estas evidenta, ke la letereskribinto relegis sian leteron por kontroli la gramatikon kaj ortografion, ĉar korektaĵoj estis faritaj en la teksto. Ekzemple, ofta aldonaĵo estas serio da plume skribitaj "n"-literoj ĉe la fino de vortoj, kiuj ne estis akuzativigitaj. Jen frazo aperinta en multobligita cirkulero, kies teksto estis tajpita.

"Kelkajn verkojn - premiitajn/aŭ ne-, speciale tiujn/netro longaj, do, poemojn, ni aperigos en la revuo."

Oni unue tajpis "premiitaj" kaj "tiuj", ĉar oni ne rimarkis, ke ili devas akordi kun "kelkajn verkojn", la objekto de la verbo "aperigos". Por ĝustigi tiun eraron, oni enŝovis "n" inter la nominativan formon kaj la sekvan vorton, sed forgesis fari la saman post "longaj"!

Ni nun ekzameni aliajn specojn de manko de akuzativa akordo venantaj el publikigaĵoj, kies lingvouzo devis esti rigore kontrolita fare de redaktoroj kaj korektistoj.

En Sennacieca Revuo troviĝas jena frazo.

"...ili ne povis imagi pli altan politikan sistemon ol la amata urbo..."

"Ol" estas konjunkcio kunliganta du samnaturajn komparitaĵojn: (1) politika sistemo, kaj (2) urbo. La komparitaĵo, kiu sekvas "ol", devas havi la saman substantivan naturon de la komparitaĵo staranta antaŭ ĝi. Konsekvence, ĝi devas havi ankaŭ la saman kazon. La senco de la frazo estas, ke oni kompare imagas politikan sistemon kaj urbon. Ĉar tiu ĉi vorto estas samnatura kiel la objekto de la verbo "imagi", ankaŭ ĝi devas esti en la akuzativa kazo. La ĝustig-

gita frazo estas:

"...ili ne povis imagi pli altan politikan sistemon ol la amatan urbon..."

Kelkfoje "ol" estas uzata post vortoj, kiuj, kvankam ne estante formale komparitaĵoj, tamen esprimas neegalecan komparon, kiel ilustras frazo ŝerpita el Literatura Foiro.

"Rikardo rifuzas agnoski alian instancon ol si mem kaj hazardo..."

La verkinto volis diri, ke Rikardo agnoskas du instancojn, sin kaj hazardon, sed neniun alian. La korektita frazo tekstas jene:

"Rikardo rifuzas agnoski alian instancon ol sin mem kaj hazardon..."

El Budapeŝta Informilo venas ankoraŭ unu speco de akuzativa akordmanko.

"Do ni atendas reprezentantojn de ambaŭ seksoj, se eble pli aĝaj ol 18-jaraj."

La adjektivoj "aĝaj" kaj "18-jaraj" rilatas ne al la nominativa substantivo "seksoj", sed al la akuzativa substantivo "reprezentantojn", do oni devas skribi la frazon jene:

"Do ni atendas reprezentantojn de ambaŭ seksoj, se eble pli aĝajn ol 18-jarojn."

Kiam "kiel" funkcias kiel partikulo kun la signifo "estanta", "en la funkcio de" aŭ "havanta la identecon de", ne devas esti problemo pri akordo. Trovu la eraron en la sekva frazo el Nitra Informilo.

"Tiu ĉi feliĉon, tiu ĉi venkon konsideris iuj kamaradoj kiel fino de tuta laboro."

Ĉar "feliĉo" kaj "venko" estas ekvivalentoj de "fino", ili ĉiuj devas akordi, do ankaŭ "fino" estu en la akuzativa kazo.

"Tiu ĉi feliĉon, tiu ĉi venkon konsideris iuj kamaradoj kiel finon de tuta laboro."

## LA SISTERONA AKUZATIVO

Vi verŝajne neniam trovos la nomon de tiu speco de akuzativo en lernolibro pri Esperanto, aŭ aŭdos pri ĝi en kurso, sed ĝi estas ne tro malofta peko kontraŭ la gramatiko de la Internacia Lingvo, kiel montras la sekvaj citaĵoj.

1. "...plej ofte ili iĝis de regionaj, lokaj seminarioj, ĉar mankis preskaŭ komplete la amikojn de la proksimaj urboj."  
(L'Esperanto)
2. "...ekzistis ne sole sufiksoj por la monatoj kaj semajnaj tagoj, sed eĉ specialan formon por esprimi la rilaton "doni" kaj "preni"..." (Leteroj de Zamenhof)
3. "...oni konstatis ke estis restintaj 20 porciojn."  
(Revista Portuguesa de Esperanto)
4. "Ĝenerale mankas materialojn evidente engaĝitaj en socialaj kaj politikan vivon de nuntempa mondo."  
(Esperanta Gazetaro en la Mondo)
5. "Certaj statistikoj elkalkulis, ke en la mondo estas aktuale ĉirkaŭ 5 milionojn adeptojn de esperanto."  
(Esperanta Gazetaro en la Mondo)

Plena Analiza Gramatiko (PAG) informas, ke la nomo "sisterona akuzativo" venis de Raymond Schwartz, kiu elektis ĝin, ĉar la koncerna malĝustaĵo svarmis sur la paĝoj de Esperanta gazeteto eldonita en Sisteron, urbeto en la sudokcidenta Francio. Kiel oni povas facile observi, la eraro en ĉiu frazo ne konsistas el manko de la akuzativa kazo, kio ofte karakterizas la lingvouzon de komencantaj lernantoj de Esperanto, sed el trouzo de tiu kazo. Substantivo, kiu estas la subjekto de la frazo kaj sekvas la verbon, havas la akuzativan finaĵon "n". Tiuj verboj apartenas al du grupoj: (a) statverboj esprimantaj la ideon pri stato, estmaniero, kaj (b) kopuloj esprimantaj rilaton inter ilo aŭ aĵo kaj kvalito apartenanta al ĝi. La kvin frazoj estas ĝustigendaj jene.

1. "...ĉar mankis...la amikoj..."
2. "...ekzistis...speciala formo..."
3. "...estis restintaj 20 porcioj..."
4. "Ĝenerale mankas materialoj..."
5. "...estas aktuale ĉirkaŭ 5 milionoj..."

PAG rimarkigas, ke la akuzativigo de postmetita subjekto estas karakteriza eraro de latinidlingvanoj. Ke ĝi ne estas ilia ekskluziva mesaĝo, indikas frazoj 4 kaj 5, ĉerpitaj el verko tradukita de pola esperantisto.



# LA KIALO DE LA SUPERFLUA UZO DE LA AKUZATIVA KAZO

Kvankam oni povas argumenti, ke Esperanto estas relative facile lernebla lingvo, objektivaĵaj atestoj indikas, ke kelkaj partoj de la gramatiko estas malfacile lerneblaj. La ĝusta uzo de la akuzativa kazo estas unu el la daŭraj problemoj sur ĉiuj niveloj de la lingvolernado, kaj multaj paĝoj jam estis dediĉitaj al diskutoj pri la universala tendenco ellasi la finaĵon "-n". Sur la alia flanko de la medalo estas parencan problemoj: la egale erara trouzado de la akuzativa kazo por vortoj, kiuj ne funkcias kiel rektaj objektoj en frazoj. Kelkaj ekzemploj ilustras tiun fenomenon.

1. "Speciale por junajn junulojn ni volas aranĝi plaĉan programon."
2. "Ni kredas, ke vi trovos nian proponon...sufiĉe interesan."
3. "Makulas ĝin bedaŭrinde...viajn rimarkojn."

En la frazo n-ro 1 la eraro konsistas en la uzo de la akuzativa kazo post la prepozicio "por". La dua citaĵo devas esti ĝustigita jene: "...vi trovos nian proponon...sufiĉe interesa." La adjektivo "interesa" estas la predikativo de la objekto "proponon". La predikativo estas maniero esprimi kvaliton, kiun oni atribuas al la objekto en la frazo helpe de verbo. Ĝi devas esti en la nominativa kazo. En frazo n-ro 3 la subjekto estas "viaj rimarkoj", kiu sekvas la verbon; ĝi devas esti nominativa.

Gramatikistoj kutime atentigas pri tiaj eraroj kaj supozas, ke ili estas la rezulto de nescio pri la koncernaj gramatikaj reguloj. Tamen, kiam temas pri eraroj en publikigitaj tekstoj verkitaĵ de esperantistoj, kiuj jam ne estas komencantoj, oni devas pli profunde esplori la kaŭzon. Estas sciate, ke parolantoj de Esperanto, kiuj ja scias la regulojn pri la uzo de la akuzativa kazo, ne ĉiam povas apliki tiujn regulojn, jen pro laceco, jen ĉar ili estas malatentaj, jen kaŭze de manko de tempo por pensi pri la gramatika konstruo de ĉiu eldiro. Tiuj faktoroj efikas malfavore ĉefe sur la parolan lingvon, sed ankaŭ en leteroj la lingvouzo ofte estas riproĉebla.

Lingvistoj observas, ke persono, kiu ellasas la akuzativan finaĵon, dum li parolas en Esperanto, post kelkaj momentoj povas konsciigi pri sia eraro, kaj tio estigas malagrablan senton. Ju pli oni suferas pro tiuj embarasoj, des pli oni strebas eviti ilin.

Rezulte de tio, la finaĵo "-n" estas superflue uzata, ĝuste en tiuj partoj de la frazo, kie ĝi ne estas bezonata. Ekzemple, la parolanto lernis, ke la akuzativo estas uzata post kelkaj prepozicioj, kiam temas pri almovo. Ĉar li scias, ke kelkfoje li ne ĝuste akuzativigas la substantivon, estiĝas en li tendenco aldoni la "-n" al ĉiuj postprepoziciaj substantivoj. Simila situacio troviĝas en frazoj kun inversa vortordo, kiam la finaĵo "-n" estas aldonita al la postverba substantivo, kiu vere estas la subjekto de la frazo.

Por maloftigi la superfluan uzon de la akuzativa kazo, estas konsilinde, ke instruantoj de Esperanto kaj verkantoj de lernolibroj preparu specialajn ekzercojn por reliefigi la kialon de la eraroj kaj helpi lernantojn gardi sin kontraŭ ili.

## LA SIGNIFO DE ADJEKTIVOJ KUN LA PREFIKSO "TRANS"

Demando pri la prefiksa signifo de "trans" estis prezentita de K.G.Linton el Aŭstralio (Heroldo de Esperanto, 1973, n-ro 4-5, pĝ. 5). Li diras, ke "transmaraj landoj" estas evidente "landoj, kiuj situas ĉe la alia flanko de la maro", sed demandas, kion povas signifi "transatlantika vojaĝo"? Laŭ lia interpreto, ĝi estas vojaĝo, kiu komenciĝis ĉe unu flanko de Atlantiko kaj finiĝis ĉe la alia flanko. Tamen, mia opinio, en alia kunteksto ĝi povas signifi vojaĝon faritan en transatlantikaj landoj. La ambigueco estas pli okulfrapa en jenaj esprimoj: "transmara komerco" kaj "transoceana esplorado". Ĉu la komerco kaj esplorado okazis en foraj lokoj trans la maro, aŭ ĉu oni volas esprimi, ke la agadoj okazis inter vendantoj kaj aĉetantoj, kaj fare de esploristoj, sur maraj vojoj? Ankaŭ en Plena Ilustrita Vortaro (PIV) troviĝas kontraŭaj difinoj.

- a. transmara - estanta trans la maro (transmara lando, komerco)
- b. transoceana - iranta trans oceano (transoceana flugo)

Fakte, "maro" kaj "oceano" estas sinonimoj; kial, do, PIV difinas la prefiksitaĵajn vortojn dumaniere? Tium ambiguecon rimarkis ankaŭ Eugen Wuster (Die Verhältnißwörter des Esperanto, 1968, § 7.2, pĝ. 16), kiu analizis "transmara" jene: (1) estanta trans la maro, (2) iranta trans la maron.

Ankoraŭ du transakvaj ekzemploj montros la nekonsekvencan difinadon en PIV.

- c. transatlantika - sen difino (transatlantika flugado)
- ĉ. Transganga Hindujo - la parto de Hindujo kuŝanta oriente de Gango.

La signifo de "transatlantika flugado" probable similas al tiu de la difinita "transoceana flugo"; la prefikso "trans" indikas la direkton kaj celon - al la alia flanko de akvoetendaĵo. Male, "Transganga" estas difinita kiel rilatanta al loko sur la alia flanko de la rivero.

Unu adjektivo bazita sur montara nomo estas registrita en PIV.

- d. transalpa - troviĝanta sur la galla aŭ franca flanko de la Alpoj

La adjektivo priskribas lokon transe de Alpoj. Rimarko, ke la parto

de Hindujo okcidente de Gango estas "Cisganga Hindujo", kaj "cis-alpa" rilatas al la itala flanko de Alpoj.

Ankoraŭ unu anomalio estas la kazo de la substantivo post "trans", kiam temas pri movo al alia flanko. Dum en PIV troviĝas "iranta trans oceano" kum la nominativo, Wüster skribas "iranta trans la maron" kun la akuzativo. Malgraŭ zamenhofaj ekzemploj kun la akuzativo, G.Waringhien argumentas favore al la nominativo (Plena Analiza Gramatiko, 1980, §189.7, pĝ. 258). Kiam temas pri prefiksitaĵ adjektivoj, pluraj povas esti ambiguaj, se mankas sufiĉe klara kunteksto. La enkonduko de la akuzativo helpas elimini dubon pri la senco. Mi proponas kiel solvon la adjektivigon de la adverba akuzativo de direkto (ekz-e "hejmen", "teren", "ĉielen") por indiki, ke la agado okazas ne sur la alia flanko sed de unu flanko al la alia.

transmar + en + a = transmarena  
transocean + en + a = transoceanena  
transatlantik + en + a = transatlantikena  
transalp + en + a = transalpena

Por emfazi, ke la prefiksita adjektivo rilatas nur al la transa loko sen al- aŭ tramovo, oni povas uzi kiel prefikson "transede-" aŭ "eltrans-".

transedemara	eltransmara
transedeoceana	eltransoceana
transedeatlantika	eltransatlantika
transedealpa	eltransalpa

## LA KAZO POST "ESKAPI"

En prilingva artikolo aperinta en Scienca Revuo, mi legis jenan frazon verkitan de esperantologo.

"La kaptito eskapis la prizonon."

Mia opinie la akuzativigo de la vorto "prizono" ne estas gramatike pravigebla. Komparu ankaŭ la sekvajn frazojn, en kiuj akuzativa substantivo sekvas la verbon "eliri".

- a. "Kiam s-ro N., vizitante Moskvon antaŭ kelkaj semajnoj, eliris la aŭton por iom moviĝi inter la homoj, li provis en la rusa diri nur "tre bele". (Esperanto)
- b. "...ĝuste tiam ĉesis mallonga periodo de iom pli libera diskutado en la soveta lingvistiko kaj de timemaj provoj eliri la rigidiĝintan framon de la jafetida teorio..." (La Danĝera Lingvo)
- c. "...ili triumfe eliris la butikon kun pakajo..." (Okuloj)

En Plena Ilustrita Vortaro (PIV), ĉe la artikol-vorto "akuzativo", Rimarko 2 tekstas: "Malkonsilinde estas uzi akuzativon anstataŭ prepozicio, kiu signifas deiron, formovon kaj tiel kontraŭdiras la direktan signifon: oni diru: eliri el urbo kaj ne: eliri urbon." Sur paĝoj 441 kaj 442 troviĝas pluraj ekzemploj, kelkaj ankaŭ zamenhofaj, de la uzo de "eliri" kun la prepozicio "el".

Rilate la uzon de la akuzativo post verboj aŭ prepozicioj kun demova senco, Plena Analiza Gramatiko (PAG) klarigas jene.

§178, Rim. III: ...oni neniam legas ekz-e "eliri urbon", ĉar tio povas ankaŭ signifi "eliri kaj direkti sin al urbo".

§190, A 1: Demovo. Ĝi estas ĉiam esprimata per prepozitivo, helpe de la prepozicioj:

de: mi venas de la hejmo

el: ne gutas mielo el la ĉielo<sup>z</sup>; trinki el glaso

for de, diĝde: ili iris for de la domo

§190, A 3, Rim. V: ...oni ne uzu akuzativon, se la prepozicia prefiksoido havas senco demovan...

§192, 1: Neniam oni uzu akuzativon post la movaj prepozicioj: de, el, preter, al, ĝis, ĉar ili per si mem jam esprimas sufiĉe la movon.

§ 373. c. Rim. IV: Esceptan neuzon ĉe el kaj de klarigas, ke la akuzativo en Esperanto montras direkton almovan, do ĝuste kontraŭan al la demova senco de tiuj prepozicioj; tial oni sentus strangaj la esprimojn: eliri la domon; deveni nobelan patron.

Se la kialo de la neuzo de akuzativo post "eliri" nun estas klara, kion diri pri la verbo "eskapi"? Ankaŭ ĝi sendube havas demovan senco. Laŭ PIV ĝi estas netransitiva verbo, signifanta; (1) "liberigi sin de tio, kio katenas; sukcese eviti per forkuro", kaj (2) "provi forgesi la vivtenajn zorgojn, la sintrudantan realaĵon". Rimarku, ke en la pli frua Plena Vortaro (PV) la sama verbo estis signita per (x), kiu indikas, ke ĝi povas esti uzata kaj transitive kaj netransitive. Sekvas la difinon jena ilustraĵo: "eskapi ion, de io, el io". En PIV ĉiuj ekzemploj frazoj de la unua difino montras la netransitivan uzon de la verbo. Ĉe la dua signifo, kiu estas figurascenca, troviĝas la frazo "romantikismo estas esence provado eskapi la burĝajn malnoblaĵojn." Ĉu tiu ĉi uzo de "eskapi" vere estas transitiva kun rekta objekto, aŭ ĉu la akuzativa "-n" de la substantivo "malnoblaĵojn" tutsimple anstataŭas la prepozicion "de"? Oni reiru al la frazo ĉerpita el Scienca Revuo kaj komparu ĝin kun la unua ekzemplo en PIV: "eskapi el malliberejo". Aliaj ekzemploj estas "eskapi el monaĥinejo", "eskapi senvunda el batalo, el tertremo", kaj "la eskapintoj el la enfalinta minejo". Figuran senco havas "eskapi el sia mizera situacio".

Alia leksikografo, M.C. Butler, en sia Esperanto-English Dictionary, indikas, ke "eskapi" estas uzata kun unu el la sekvaj prepozicioj: al, de, el. Eĉ se oni uzas al post "eskapi", oni devas subkompreni "de iu loko". Konklude, la formulo estu: eskapi + el + substantivo en la nominativa kazo.

# LA MALĜUSTAJ VERBOJ "ELMERGIĜI" KAJ "SUBMERGIĜI"

Nek "elmergiĝi" nek "submergiĝi" estas logike kunmetitaj verbformoj; tamen ambaŭ estas daŭre uzataj. Kial? Unue, mi citos kelkajn ekzemplojn por ilustrati la uzadon en kunteksto.

1. "Mi serĉis teron, en la direkto de la marhorizonto, malproksime, tute malproksime elmergiĝis insulo."  
(Interesa Arkeologio)
2. "La fama redaktoro de mondtelevido, Trevort elmergiĝis el siaj notaĵoj." (La Kancerkliniko)

La unua citaĵo temas pri insulo, kiu aperis de sub la akvo, t.e. ĝi elvenis el la akvo. La sekva ekzemplofrazo ilustras la figuran senco de "elmergiĝi"; la viro venis el absorbiteco en siaj notaĵoj.

3. "Tiu sonaro vere montris grandajn objektojn, kiuj rapide supreniĝas kaj submergiĝas..." (En Novan Mondon)
4. "Tamen, multaj ekmembroj de JPEU submergiĝis en JEI."  
(La Danĝera Lingvo)

Frazo 3 priskribas objektojn, kiuj venas el la akvo kaj eniras en la akvon sub la surfaco. "Submergiĝi" estas uzata ankaŭ figure en la kvara citaĵo, kiu informas, kiel membroj de iu organizaĵo kaŝis sin en alia, t.e. ili iris subteren por plue agadi.

La difino de la baza verbo "mergi" estas laŭ Plena Ilustrita Vortaro (PIV) "enmeti en likvaĵon"; "mergiĝi", do, signifas "eniĝi en akvon, likvaĵon". Ĉar tiuj agoj okazas sub la surfaco de la akvo, tute ne estas bezonata la sufikso "sub-". Por esprimi la kontraŭon, oni tutsimple uzas la prefikson "mal-": "malmergi" signifas "elmeti el akvo, likvaĵo", kaj la difino de "malmergiĝi" estas "eliĝi el akvo, likvaĵo". Ankaŭ la prefikso "el-" estas superflua, ĉar "mal-" donas al la verbo la signifon de elmovo. La malĝusta verbformo "elmergi" estas analizebla nur jene: "eksteren enmeti en likvaĵon". Tio estas sensencaĵo. Sammaniere, por formi la kontraŭojn de "penetri" ("eniĝi profunden internen") kaj "plonĝi" ("lerte sin ĵeti en akvon") oni devas diri "malpenetri" kaj "malplonĝi" respektive. La prefikso "el-" mem ne havas la kapablon inversigi la direkton "en", kiu estas esenca parto de la difino.

Plej verŝajne la formo "elmergiĝi" havis kiel modelon "elakv-

iĝi", sed tiu ĉi estas logike formita kunmetaĵo; el la substantiva radiko "akv-" estas aldonita la prefikso "el-" kaj la sufikso "-iĝ"; la kunmetaĵo signifas "eliĝi el akvo". Analogie estas eble pluformi la verbojn "eningigi" kaj "elingigi" surbaze de la substantivo "ingo". Etnolingvaj vortoj kiel la anglaj emerge kaj submerge kaj la francaj émerger kaj submerger sendube influis la registron de "elmerg(ig)i" kaj "submergebla" en Plena Vortaro kaj ankaŭ en kelkaj etnolingvaj Esperanto-vortaroj. PIV ĝuste evitas la mallogikajn kunmetaĵojn de "mergi" kun "el-" kaj "sub-".

Mi provis spuri la historion de la morfemo "merg-" por ekscii, kial ĝi estis nekonsekvence pluformita. En 1910 Verax registris "mergi" kiel teknikan vorton signifantan "meti tute en likvaĵon" kaj tradukis ĝin francen per plonger. Li enkondukis ankaŭ la verbon "emerĝi" kun la signifo "eliri el likvaĵo". Samjare la Plena Vortaro de Boirac difinis "mergi" per "subakvigi". Rimarku, ke la difino fariĝis malpli vasta; temas nur pri akvo kaj ne likvaĵo ĝenerale. Boirac aldonas la prefiksojn "el-", "en-" kaj "sub-" al "merg-", kaj tio plej probable estas la deirpunkto de la malĝusta uzado ĝis nun. En 1923 Wŭster, difinante la verbon "emerĝi", limigis ĝian uzon al la fiziko kaj la optiko. La plej freŝdatan modifon faris K. Pič en 1981. Li proponas la novan morfemon "merĝ-": liaj "merĝi" kaj "elmerĝi" estas la ekvivalentoj de "mergiĝi" kaj "elmergiĝi" respektive. Denove troviĝas nekonsekvenco pro la uzo de "el-" anstataŭ "mal-". Por didaktikaj celoj mi proponas, ke oni instruu nur la formojn "mergi/mergiĝi" kaj "malmergi/malmergiĝi" (temas pri iu ajn likvaĵo, ne nur akvo. La figura senco estas esprimebla ankaŭ per jenaj sinonimoj: "enprofundiĝi" kaj "interniĝi"; "eliĝi", "ekmontriĝi", "ekaperi" kaj "elveni".



## "POLUCII", "POLUCI" AŬ "POLUI" ?

Ekde la fruaj jaroj de Esperanto homoj objektis, ke la pseŭdo-sufikso "-cio" ne estas bezonata. Pro la skemisma kaj aglutina naturo de la Internacia Lingvo oni povas esprimi la signifon de vortoj finiĝantaj per "-cio", aldonante al radikoj diversajn Esperantajn sufiksojn, kiuj pli precize funkcias ol la polisemia "-cio". En Universala Vortaro Zamenhof inkludis la radikojn "redakci-" kaj "redaktor-"; ambaŭ estas tradukitaj per substantivoj en kvin etnolingvoj. En la Unua Oficiala Aldono estis registrita la verbo "redakt/i", kiu donis la eblon pluformi la substantivojn "redaktanto", "redaktisto", "redaktantaro", "redaktejo" ka. Tio efektive faris "redakcio" kaj "redaktoro" arkaikaj kaj superflujaj. Tamen, ne ĉiuj esperantistoj samopinias, kaj estas tendenco konservi, eĉ plivastigi la uzon de vortoj finiĝantaj per "-cio", ĉar ili aspektas pli internacie aŭ ĉar oni volas doni al ili specialan nuancon aŭ signifon apud la regule formitaj Esperantaj formoj. Tiel argumentas Edmond Privat en sia verko Esprimo de Sentoj en Esperanto:

"Laŭ observo de la nunaj faktoj ŝajnas, ke pli sukcesa ĝenerale la Esperanta formo, se ĝia senco estas plenegala kun la fremda, skz-e evoluo = evolucio, civilizo = civilizacio, sed kiam la senco estas iom malsama, la lingvo emas konservi ambaŭ por riĝigi siajn eblecojn de esprimado.

Administracio estas oportuna vorto por kovri ejon kaj aron de homoj, anoniman tuton de administrantaro en administrujo, kiun oni povu kulpigi pro multaj eraroj aŭ krimoj ne akuzante iun apartan personon. Same pri redakcio. Redaktoro estas funkcio, kiun povas plenumi okaza redaktanto aŭ profesia redaktisto" (pĝ. 18).

Misopinie oni pagas grandan prezon dum la lernado kaj instruado de Esperanto nur por povi havi eblon esprimi nuancon, kiu tre malofte estas bezonata. Eĉ vortaroj ne informas pri tiu riĝigo de esprimebleco; "redaktoro" en Plena Ilustrita Vortaro (PIV) estas sinonimo de "redaktisto".

Unu el miaj korespondantoj, skribante al mi pri tiu ĉi temo, kompilis liston de mankantaj verboj en PIV, kiujn li volas substitui al tiuj formitaj surbaze de substantivo kun la pseŭdosufikso "-cio". Inter ili estas "aliteri" "diskrimini" kaj "frustri", ki-

uj anstataŭos "aliteracii", "diskriminacii" kaj "frustracii" respektive. Generale mi subtenas tiun proponon, ĉar la rezulto estas favora por la Internacia Lingvo; la pluformitaj substantivoj estos malpli longaj kaj estos regule formitaj per Esperantaj sufiksoj kun pli preciza signifo ol tiu de la semantike nebula "-cio". Tamen, en la listo de proponitaj verboj estas kelkaj finiĝantaj per la silabo "-ci", en kiu la "c" estas vestiĝo de etnolingva substantivo kun la sufikso, kiu donas "-cio" al Esperanto. Tiuj verboj estas jenaj:

dispozici	inflaci	kremaci	rekvizici
ekskreci	instrukci	operaci	sekreci
ekspozicio	irigaci	poluci	subvenci
			vivisekci

Formante substantivojn surbaze de iliaj radikoj, oni akiras vortojn kiel "dispozico", "ekspozico" kaj "poluco". La forigo de nur unu litero, la "i", ne estas granda gajno. Zamenhof jam eksperimentis tiurilate, kiam li kreis jenajn vortformojn.

<u>Vorto:</u>	kapitulaco	obstrukco	kuraco
<u>Etimo:</u>	<u>F. capitulation</u>	<u>F. obstruction</u>	<u>L. curatio</u>

Tiuj vortoj estas esceptoj, ĉar aliloke en Esperanto la franca -tion kaj la latina -tio fariĝas "-cio".

Efektive, se oni vere volas simpligi Esperanton kaj elimini la pseŭdosufikson "-cio", kiu funkcias kiel la ekvivalento de la gramatika finaĵo "-o" signanta substantivojn, oni devas elekti kiel etimon ne la latinan aŭ etnolingvan substantivon kun sufikso, sed la sensufiksan verban radikon en la latina lingvo. Tio estas ebla en multaj kazoj kondiĉe, ke ne estiĝas homonimeca kolizio. Ekzemple, la verbo "kremacii" devas esti "kremiti", ĉar "kremacii" devenas de la latina substantivo crematio, kiu siavice havas sian originon en la verbo cremare, formita per la radiko crem- kaj la infinitiva finaĵo -are. Sed la radiko "krem-" jam ekzistas en Esperanto, do "kremac(i)i" estas bezonata por eviti konfuzon. La sekva ekzemplo montras, kiel la simpligo estas efektivebla kaj pravigebla.

Kiel la etimon de "polucio", Zamenhof elektis la latinan polutio, donante al la sufikso -tio la prononcon, kiun ĝi havas en la germana kaj rusa samdevenaj vortoj Pollution (-tion = "-cion") kaj pollucija respektive. Por verbigi la substantivon estas necese aldoni "i" al la radiko: "polucii". Se oni komencas per la ĉi-

supre proponita verboformo "poluci", la substantivoj fariĝas "poluco", "polucado", "polucaĵo", ktp., kaj oni liberigas la vorton de la pseŭdosufikso "-cio". Nu, kial halti tie? Estas eble eĉ pli efike simpligi la vorton, se oni uzas kiel radikon "polu-". Zamenhof sammaniere akiris la radikon "fortik-" de la franca etimo fortification per drasta elimino de la silabo -fi- kaj la substantiva sufikso -tion. Poste li aldonis la sufikson "-aĵ" al la radiko por krei la Esperantan vorton "fortikaĵo", kiu signifas fortification en la franca. Eĉ pli forta apogo por la elekto de "polu-" kiel radiko venas de la etimologio de la latinaj vortoj. La substantivo pollutio, senigite je sia sufikso -tio, estas pollu-; tiu ĉi estas la radiko de la verbo polluere. Polluere estas kunmetaĵo konsistanta el por "per" kaj luere, parenca al lutum "koto"; -ere estas la infinitiva finaĵo. Pollu- en la latina, do, pravigas la Esperantan formon "polui".

Problemo, kiu estas pritraktenda ĉi-rilate estas la du difinoj de "polucio" en PIV.

1. (Medicino) Nevola elfluo de spermo sen koito, precipe dum dormo
2. (Teknikoj) Malpurigo de viv-esenca elemento, kiu fariĝas malsaniga por la uzantoj

Se oni volas pli emfazi aŭ diferencigi la du signifojn per malsamaj vortoj, estu "polucio" la relative malofta medicina termino kaj "poluado" la pli ĝenerala ĉirkaŭmedia malpurigo.

#### Noto

Post publikigo de tiu ĉi artikolo la unuan fojon en 1984, okazis lingvo-evoluo en la rekomendita maniero, kaj la radiko "polu/-" estis pli ofte uzata en publikigitaj verkoj anstataŭ "poluci-". En 1987 estis publikigita la Suplemento de Plena Ilustrita Vortaro kiu estas registrita la nova radiko kun jenaj difinoj.

polu/i (tr). Danĝere malpurigi vivesencan elementon de la naturo.

poluado. Agado polui.

poluaĵo. Substanco, kiu ne degradiĝas en la naturaj kondiĉoj kaj sekve malpurigas pro amasiĝo.

# LINGVA MALEKONOMIO EN ESPERANTO: LA KAZO DE TRI SINONIMOJ — "RAPORTISTO", "RIPORTISTO", "REPORTERO"

Propagandistoj de Esperanto laŭte fanfaronas, ke unu el la bonaj kvalitoj de ilia lingvo estas ĝia facila sistemo de vortformado. Kontraŭe al la situacio en etnaj lingvoj, en kiuj ofte troviĝas pluraj diversdevenaj radikoj por parencaj konceptoj aŭ aĵoj, en Esperanto oni povas esprimi la samon uzante nur unu radikon kun aldonitaj gramatikaj finaĵoj kaj afiksoj. Jen ekzemplo el la hungara lingvo.

<u>ökör</u>	bov/o
<u>tenén</u>	bov/in/o
<u>borjú</u>	bov/id/o
<u>úszó</u>	bov/id/in/o
<u>marhahús</u>	bov/aĵ/o
<u>gulya</u>	bov/ar/o
<u>csordás</u>	bov/ist/o

---

7 radikoj

1 radiko + 5 sufiksoj + 1 gramatika  
finaĵo

Estas evidente, ke Esperanto superas la hungaran lingvon laŭ la vidpunkto de ekonomio: unu sola radiko sufiĉas por esprimi ĉiujn konceptojn rilatantajn al la bovo; la diferencigo estas farita per sufiksoj, kiuj estas aldoneblaj al ĉiuj aliaj radikoj en la lingvo kondiĉe, ke senchava vorto estas formebla.

Bedaŭrinde, esperantistoj ne ĉiam estas konsciaj pri lingva ekonomio, kaj de tempo al tempo oni trovas tendencojn nuligi tiun avantaĝon per misa vortformado kaj uzado. Unu maniero fari tion estas multigi sinonimojn, jen intence por konjekteble povi esprimi specialajn nuancojn, jen nekonscie kiel rezulto de etnolingva influo. Por ilustrati tion ĉi mi citos du frazojn aperintajn en la sama artikolo en Budapeŝta Informilo (aprilo 1981, dua kovrilpaĝo).

- a. "La redaktoro de tiu programo...komisiis raportiston Gábor Neuman fari la riporton."
- b. "Post la intervjuo, la reportero alvokis la aŭskultantojn..."

Rimarku la vortojn "raportiston", "riporton" kaj "reportero". Laŭ

Plena Ilustrita Vortaro (PIV) "reportero" estas "ĵurnalisto, kiu kolektas informojn, fotojn, intervjuojn por la gazetaro aŭ por filmogazeto." Ĝi estas sinonimo de "raportisto". La sama vortaro informas, ke "riportisto" estas sinonimo de "reportero", do sekvas, ke "riportisto" estas sinonimo ankaŭ de "raportisto", kaj la radikoj de tiuj tri vortoj estas semantike ekvivalentaj.

La formo "riportisto" estas hungardevena; ĝia etimo estas la substantivo riport. Aldonante al ĝi la sufikson "-ist", oni ricevas Esperantan vorton por traduki la hungaran riporter. Riport kaj riporter slavice devenas de la anglaj etimoj report kaj reporter respektive. Ĉi-lasta angla vorto estas la etimo ankaŭ de la Esperanta "reportero". La verbo "raporti" en la Internacia Lingvo estas spurebla al la franca verbo rapporter, kiu havas plurajn signifojn. "Report-" estas facile pluformebla en Esperanto. Kiel verbo, "raporti" signifas voĉe aŭ skribe ripeti aŭ alporti informon aŭ novaĵon, kiun oni aŭdis, vidis aŭ spertis. La rezulto de tiu agado estas "reporto" (buŝa aŭ skriba ripeto, rakonto aŭ priskribo) aŭ "raportaĵo" (gazeta artikolo). La persono faranta tiun transdonon de informoj estas "raportanto" (antaŭ kunveno) aŭ "raportisto" (sur la tereno de la ĵurnalismo en publikigaĵoj, radio, televido aŭ filmoj).

Jen mirindaĵo! Per unu radikoj, tri gramatikaj finaĵoj kaj du sufiksoj estas eble esprimi ĉiujn signifojn de la etnolingvaj etimoj. Ĉu, do, iu povas previgi la retenon de la senutilaj, balastaj radikoj "reporter-" kaj "riport-"? En la ĉi-supre citita artikolo la uzo de tri diversaj radikoj aldonas nenium sencnuancon al la kunteksto sed nur malfaciligas la legadon por tiuj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne profunde analizis la semantikan enhavon de la koncernaj vortoj.

## ANKORAŬ KELKAJ KOMENTOJ PRI "KOMUNUMO"

Mi ne tute samopinias kun la konkludoj de la terminologia pri-trakto rilate la vortojn "komuno", "komunumo", "komunumaro" kaj "komunaĵo" en Monata Cirkulero (n-ro 142, septembro, 1982, pĝ.5-8). Ivo Lapenna diras, ke "komuno" estas bonege uzebla por la Pariza Komuno de 1871. Kie ĝi estas tiel uzata, kaj kiu uzas ĝin? Bedaŭrinde, mankas ilustraĵoj citaĵoj. Mi ja trovis unu ekzemplon de tiu uzo de "komuno" en artikolo titolita "La Komuno de Parizo", aperinta en Hungara Vivo (1971, n-ro 4, pĝ. 18). Tamen, estas strange, ke la verkinto ne "elegante" derivis la formon "komunano", nek uzis la jam registritan vorton "komunumisto", sed enkondukis alian vorton, "komunardo", devenantan de la franca communard. Por montri, ke oni uzas ankaŭ "komunumo" ĉi-rilate, mi citas frazon el La Kancer-kliniko (n-ro 15, 1980, pĝ. 29): "...la "Muro de la Federistoj", kie estis mortpafitaj la lastaj revoluciuloj de la Komunumo de 1871."

La vortformo "komuno", mankanta en Plena Ilustrita Vortaro (PIV - 1970), troviĝas en Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana (1923) de Eugen Wüster, kiu registras ĝin - tute laŭregule - kiel sinonimon de "komuneco". En PIV, krom "komuneco" kaj "komunaĵo", estas ankaŭ "komunumo", kaj kiel ekzemplo de ties dua signifo troviĝas la frazero "la Pariza Komunumo (de 1871)". En la francaj-Esperanto-vortaroj de E. Grosjean-Maupin (1913) kaj G. Waringhien (1957), la Esperanta ekvivalento de la franca commune estas "komunumo". La formo "komuno" tute malestas.

Ĉar estas granda semantika diferenco inter "eco de io komuna" (la difino de "komuno" kaj "komuneco") kaj "ĉiuspeca societo, bazita sur komuneco de vivo kaj interesoj" (la difino de "komunumo"), mi opinias, ke estas necese diferencigi ankaŭ la formojn de la vortoj, same kiel oni faras per la sufikso "-aĵ" en "komunaĵo". Fakte, la rezonado en la menciita artikolo en Monata Cirkulero ne estas konsekvenca. Oni apogas la uzon de "komuno", surbaze de la franca "Commune de Paris", sed neniel povas pravigi la vortformon "komunaĵo" per ekzemplo de etnolingva vorto. "Komunaĵo" vere estas esperantismo.

"Komunumo" estas uzata en alia politika kunteksto, menciita nek en la artikolo en Monata Cirkulero nek en PIV. Poŝatlaso de la

Mondo (1971) uzas la esprimon "Brita Komunumo de Nacioj" por traduki la anglan British Commonwealth of Nations. Estas interese kompari la esperantigon de la polisemia angla vorto commonwealth en diversaj anglaj Esperanto-vortaroj. Laŭ J. Rhodes (1908) ĝi estas "respubliko"; Flucher kaj Long (1963) tradukas ĝin per "regno"; en la Edinburgh-vortaro ĝi estas "aŭtonomia ŝtato" kaj "respubliko"; la plej freŝdata vortaro de J.C. Wells (1969) pli ĝuste diferencigas la britan signifon - "regnaro" - disde la aŭstralia - "regno" - kaj uzas "komunumo" por commonwealth of nations. Sed ankaŭ la vortaro de Wells estas mankhava, ĉar ĝi ne sufiĉe precize kaj detale pritraktas ĉiujn signifojn de commonwealth en la angle parolanta mondo. Por tio estas necese atendi la kompiladon de plena angla-Esperanta vortaro. Provizore mi proponas jenajn tradukojn.

1. respubliko (ekz. la respublika registaro en Anglio en 1649-1660)
2. protektorato (ekz. la registaro en Anglio sub la Cromwell-oj en 1653-1659)
3. usona ŝtato (ekz. en la oficiala nomo Commonwealth of Massachusetts)
4. federa unuiĝo (ekz. en la oficiala nomo de Aŭstralio Commonwealth of Australia)
5. komunumo (ekz. British Commonwealth /of Nations/, difinita kiel asociiĝo de memregantaj aŭtonomiaj ŝtatoj kunligitaj en komuna lojaleco al Britio)
6. aŭtonomia ŝtato (ekz. en la oficiala nomo Commonwealth of Puerto Rico, kiu estas loke aŭtonomia politika unuo memvole unuiĝinta al Usono)

La evoluo de la diversaj signifoj de commonwealth en la angla lingvo estas parte klarigebla etimologie. Origine commonwealth, aŭ la arkaika formo commonweal, signifis "komunobono" (Rhodes), "komuna bono" (Edinburgh), "regna bonstato" kaj "ŝtata bonstato" (Rhodes). Komparu la francan bien public kaj la latinan res publica. Poste la vorto estis aplikata al politikaj unuoj kiel nacio, ŝtato kaj ankaŭ grupiĝo de unuoj. Estas evidente, ke "komunumo" taŭgas por traduki nur la kvinan signifon de commonwealth. Nur la angla vortaro de Wells tradukas ĝin per "regnaro", sed ĝi verŝajne ne tute adekvate esprimas la signifon de commonwealth, ĉar en Aŭstralio: koncizaj faktoj, la aŭtoro ne kontentiĝas per "la Brita Regnaro"

kaj "La Regnaro" sed interkrampe glosas ambaŭ per la angla vorto Commonwealth (pĝ. 78-79). Se oni devas glosi Esperantan vorton aŭ esprimon per angla klarigo, tio ja estas grava afero, ne por la angla lingvo sed por Esperanto, kiu, kiel internacia lingvo, devas esti senlime esprimkapabla. Eble la tubero en tiu ĉi afero estas la vorto "regnaro", kiu ne taŭgas por traduki commonwealth. Ĉu "la Brita Komunumo" ne estas pli klara esprimo?



# ERARVAGANTE EN LA VERDA "GRAF"-LANDO

Unu el la novaj terminoj, kiujn mi lastatempe proponis por Slipara Vortaro, kompilata de Rüdiger Eichholz, estas "opistografo". Ĝi estas fakvorto uzata en la arkeologio, signifanta "manuskripto aŭ gravurita ŝtono, kovrita per skriba teksto aŭ bildo sur la re- verso same kiel la averso; ankaŭ materialo presita ambaŭflanke de paperfolio." S-ro Eichholz diris, ke li preferas la formon "opisto- grafaĵo", ĉar lia opinio, pro la finaĵo "-grafo", "opistografo" es- tas ambigua, kaj oni povas pensi, ke temas pri persono. Fakte, en kunteksto estas apenaŭ kredeble, ke tiu miskompreno povas okazi. Por montri, kie troviĝas la vera problemo rilate vortojn en Espe- ranto finiĝantajn per "-grafo", mi resumos la semantikan enhavon de la morfemo "graf".

- I. graf/o. Plena Ilustrita Vortaro (PIV) difinas ĝin jene: "per- sono havanta nobelan titolon, kiu rangas inter markizo kaj vic- grafo." "Graf/o" estas uzata kiel ĉefelemento en kunmetaĵoj ki- el "kastelgrafo", "landgrafo", "limgrafo" kaj "vicgrafo". Cete- re, ĝi aperas en tiel nomataj antaŭ-esperantaj kunmetaĵoj kiel "mark(o)grafo" aŭ "margrafo" (princa titolo) kaj "burgrafo" (sinonimo de "kastelgrafo").
- II. graf/. Ĝi estas homonima kaj polisemia vortfinaĵo, laŭ PIV "helendevena elemento de scienca vorto." La helena etimo gra- phos, derivita de la verbo graphein, "skribi", fariĝis graphus en latino kaj graph aŭ graf en modernaj lingvoj. En Esperanto, kie ĝi funkcias nek kiel sufikso nek kiel pseŭdosufikso, ĝi ha- vas tri signifojn.
  - a. praktikanto de arto aŭ tekniko: etnografo, pornografo, topo- grafo
  - b. aparato uzata en arto, tekniko aŭ scienco: barografo, helio- grafo, pantografo
  - c. rezulto, produktaĵo aŭ objekto de la koncerna arto aŭ tek- niko: aŭtografo, epigrafo, paragrafo.

Vere ekzistas granda kaoso en la semantiko de la "graf"-vor- toj en Esperanto, kiel ilustras la sekvaj ekzemploj, ĉerpitaj el PIV.

La litografio kaj la ksilografio ambaŭ estas grafikaj teknikoj aŭ artoj. La metiisto, kiu praktikas la unuan estas litografisto, sed la artisto okupiĝanta pri la dua estas ksilografo. La litografisto produktas litografojn; la rezulto de la laboro de la ksilografo estas ksilografajoj. Stenografio estas "sistemo de signoj, por stenografi"; stenografisto estas profesiulo, kiu skribas tekstojn en stenografio. La vortformo "stenografo" mankas en PIV, sed ĝi estas registrita en aliaj vortaroj kiel sinonimo de "stenografisto". Male, "fotografo", kiu troviĝas en PIV, ne estas sinonimo de "fotografisto", sed signifas "fotografado", ago de "fotografanto". Tamen, en kelkaj Esperanto-vortaroj, "fotografo" estas sinonimo de "fotografisto".

Se la leganto ankoraŭ ne estas konfuzita, li provu orienti sin en la sekva vortlabirinto. Radiografisto faras radiografajojn, kaj telegrafisto sendas telegrafajojn. "Telegramo" estas sinonimo de "telegrafajo", sed "radiogramo" ne estas sinonimo de "radiografajo". Kardiografoj registras kormoviĝojn per kardiogramo, sed fonografo ne produktas fonogramojn (vorto registrita en Plena Vortaro (PV) sed mankanta en PIV), kaj el hektografoj ne venas hektogramoj! Krome, la tekstoj de epigrafoj ne ĉiam estas epigramoj.

Ekzemploj ankoraŭ ne elĉerpiĝis. Holografo estas "testamento, skribita tute de la mano de la testamentinto"; ĝi ne estas la rezulto de la holografio, procedo de reliefa fotografado per laseroj, ĉar tiu objekto estas hologramo. Kvankam aŭtografo estas "skribaĵo propramane farita de iu persono mem", la aŭtografio estas "procedo, per kiu oni meĥanike reproduktas manskribaĵojn." Laŭ PIV la scienca studo de epigrafoj estas la epigrafiko; aliaj leksikografoj nomas ĝin epigrafio. Fakulo okupiĝanta pri la paleografio estas paleografo, sed epigrafo ne estas esploranto; ĝi estas la esplorobjekto de epigraf(ik)isto.

Tiu ĉi "graf"-landa kaoso spegulas la vortformadon kaj uzadon de etnolingvoj. La Esperantaj vortoj ne estis sisteme formitaj konforme al la skemisma karaktero de Esperanto; kontraŭe, tie ĉi estas videbla la influo de la naturalisma skolo de planlingvistiko. La manko de simetrio kaj analogia vortformado havas ankaŭ alian kaŭzon; la cititaj terminoj ne eniris la leksikon de Esperanto samtempe, do neniu principoj povis esti formulitaj. La unuaj uzantoj

de ĉiu vorto agis laŭ siaj propraj nocioj pri la vortformado, kaj ili daŭre estis sub la influo de la formoj kaj signifoj de "graf"-vortoj en sia gepatra lingvo.

La objekto de s-ro Eichholz kontraŭ "opistografo" ne estas apogebla. Se li insistas pri "opistografaĵo", li devas agi tute logike kaj konsekvence, transformante "epigrafo" en "epigrafaĵo", "telegrafo" en "telegrafilo", "fotografo" en "fotografisto", ktp. Sed estas bone sciata, kio okazos, se oni ĉi-maniere provas tuŝi-fuŝi Esperanton. La "graf"-vortoj en sia nuna formo verŝajne longe restos en la lingvo por perpleksigi lernantojn kaj Akademianojn, kaj demonstri, ke Esperanto ne estas lingvo tiel facila, kiel volas kredigi la verdverdaj propagandistoj.

## FOR LA FALSAJN AMIKOJN!

La lingvistika termino "falsa amiko" estis uzata la unuan fojon fare de la francaj lingvistoj Maxime Koessler kaj Jules Deroquigny en la verko Les faux amis ou les pièges du vocabulaire anglais. Conseils au traducteurs (La falsaj amikoj aŭ la kaptiloj de la angla vortprovizo. Konsiloj al tradukistoj), eldonita en Parizo, 1928. Ili celis atentigi parolantojn de la franca lingvo pri vortoj en la angla, kiuj supraĵe similas al francaj vortoj, sed kiuj havas malsamajn signifojn. Pro tio, tiuj "kaptiloj" prezentas danĝerojn por tradukantoj. Simila pritrakto de insidaj vortoj en Esperanto, kiuj povas erarigi france parolantajn, troviĝas en la broŝuro Falsaj Amikoj en Esperanto, kompilita de Roger Bernard kaj André Ribot (Marmande, Francio, 1971). La sekvaj kvin citaĵoj ilustras tiun ĉi fenomenon. Ĉu vi povas trovi la falsan amikon en ĉiu frazo?

- a. "...du oficialaj lingvoj por Kanado ne estas medicino sed veneno..." (Lumo)
- b. "La forpasinto testamente petis, ke oni ne faru por li religian oficon." (Monata Cirkulero)
- c. "Ekde nun, konkretaj paŝoj kaj akcioj estas bezonataj." (Budapeŝta Informilo)
- ĉ. "Lia patro ne mortis dum la milito, neniuj tatuoj sur ties pulso..." (Monato)
- d. "Ni petas...helpi al ni per diversspecaj materialoj - libroj, prospektoj, plakatoj, bildoj..." (Starto)

Parolantoj de la angla, franca, hungara, itala kaj rusa lingvoj estis trompataj de jenaj Esperantaj vortoj: "medicino", "ofico", "akcio", "pulso" kaj "plakato" respektive. Ni ekzameni ĉiun vorton por ekscii, kial ĝi fariĝis falsa amiko. La difinoj venas el Plena Ilustrita Vortaro (PIV).

- a. Medicine en la angla lingvo havas du signifojn: (1) kuracilo kaj (2) medicino "scienco pri sano kaj malsanoj kaj arto ilin kuraci". Laŭ la kunteksto de la citita frazo, tiu ĉi signifo ne konvenas. La verkinto devis traduki la anglan medicine per "kuracilo" aŭ alia sinonimo en Esperanto kiel "medikamento" aŭ "medicinaĵo".

- b. "Ofico" en Esperanto signifas laŭ PIV "okupo, profesio, konsistanta en plenumado de publika aŭ privata servado." Tiu ĉi difino ne faras la frazon senchava. Ĉar ĝi estis skribita de franclingvulo, kaj ĉar la adjektivo "religia" rilatas al "ofico", estas evidente, ke temas pri unu el la signifoj de la franca vorto office. Kvankam ĝi povas esti tradukita per "ofico" kaj "oficejo", kiam oni parolas pri office divin aŭ office religieux la sola ĝusta traduko estas "diservo".
- c. Hungaraj esperantistoj daŭre misuzas la vorton "akcio" en Esperanto pro ĝia simileco al la hungara akció. En PIV "akcio" estas "frakcio de la kapitalo de financa societo aŭ industria entrepreno, kies posedo rajtigas partopreni en ĝiaj proprietaĵoj kaj en ĝiaj profitoj" kaj ankaŭ "atesto pri tia partopreno, valorpapiro." Male, akció en la hungara lingvo signifas "agado, entrepreno, kampanjo, milita operaco." Oni, do, anstataŭigu "akcioj" per "agadoj" en la citita frazo. Tiu ĉi perfidema falsa amiko trompiĝas eĉ la kompilinton de Hungara-Esperanta Vortaro (Budapeŝto, 1964), kiu tradukis akció kaj akcióbizottság per "akcio" kaj "akcikomitato" respektive!
- ĉ. Tati ciferojn sur pulso estas sensencaĵo, ĉar "pulso" signifas "batado de arterioj kaŭzata de la sangoflue". La gepatra lingvo de la aŭtoro de la artikolo, en kiu aperas la frazo, estas la itala, kaj tio solvas la enigmon. La itala vorto pulso similas al "pulso" en Esperanto laŭforme kaj laŭsignife, sed ĝi havas ankoraŭ unu signifon, kiun "pulso" ne havas: "manradiko", "manartiko", "pojno". Ĝuste tie ne estas tatiĵoj la ciferoj.
- d. Tie ĉi la kulpa vorto estas "plakato". En Esperanto ĝi povas esti nur la substantivigita formo de la pasiva participo de la verbo "plaki": "almeti maldikan folion aŭ lameton el multekosta materialo sur pli dikajn kaj pli ordinaran subportilon". La formo "plakato" ne estas klara en la frazo, kaj eĉ la vorto "plakaĵo" ne taŭgas. Ĉar la frazo estis ŝerpita el teksto verkita de ruslingva esperantisto, oni serĉu similan rusan vorton. La Rusa-Esperanta Vortaro de E. Bokarev (Moskvo, 1966) informas, ke плакат estas

"afiŝo" en Esperanto. Nun la frazo estas bone komprenebla. Sed se oni konsultas la Esperanta-Rusa Vortaro (Moskvo, 1974), kompilitan de la sama leksikografo, oni trovas misinformon: "plakato" = plakaj!

La pritraktitaj kvin ekzemploj de falsaj amikoj en Esperanto montras, ke tiuspecaj vortoj ja estas danĝeraj. Instruantoj en kursoj, verkantoj de lernolibroj, kaj kompilantoj de vortaroj devas averti lernantojn de la Internacia Lingvo rekoni falsajn amikojn kaj eviti ilin.

## PRI LA ERARA UZO DE "ABSOLVI" EN ESPERANTO

Kolektanto estas revuo, kiu estas dediĉita al plej diversaj kolekteleblaj, inkluzive de lingvaj demandoj. En tiu ĉi artikolo mi deziras prezenti unu aspekton de kolektado sur la lingva tereno: erarojn en Esperanto. Ekzistas plurspecaj misaĵoj en la lingvouzo de esperantistoj. Fonetikaj eraroj kutime aŭdiĝas en la parola lingvo, sed de tempo al tempo ili trudas sin ankaŭ en la skriban lingvon. Gramatikaj kaj semantikaj fuŝaĵoj troveblas sur ĉiu nivelo de lingvoscio. Ĉi-sube mi donos ekzemplon de semantika malĝustaĵo. Bonvolu atente legi la sekvajn citaĵojn, kiuj venas de publikigitaj verkoj, kies aŭtoroj ne estas komencantoj sed bone konataj personuloj en Esperantujo.

1. "Sian sendube plej malfacilan vojaĝon en novembro est solvis papo Johano Paŭlo 2a en FRGermanio." (Monato)
2. "Oni...prezentis al ambaŭ eblecon absolvi la... Universitaton..." (Bulgara Esperantisto)
3. "La juna 20-jara Helmuth Daube estis absolvinta sian abituriantan ekzamenon." (Heredo kaj Raso)

Ĉu vi trovis la eraron? Rigardu la verbon "absolvi" en ĉiu frazo. Kion ĝi povas signifi en sia kunteksto? Konsultu vian vortaron.

Pastro ja povas absolvi de pekoj homon, kiu malobservis religian ordonon aŭ moralan leĝon, t.e. li pardonas kaj nuligas liajn malvirtajn agojn. Ankaŭ tribunalo povas absolvi kondamniton, deklarante lin senkulpa. Sed nek kleriko nek juĝisto kapablas absolvi vojaĝon — almenaŭ en Esperantujo. Same en la dua kaj tria frazoj, ne estas eble "absolvi universitaton" aŭ "abituriantan ekzamenon". Laŭ la ĝusta lingvouzo en Esperanto, nur persono povas esti absolvita. La uzo de tiu verbo kun objekto signifanta ajon estas evidenta germanismo. Plena Ilustrita Vortaro (PIV) klare avertas, ke oni ne uzu ĝin kun la signifo "plenumi" aŭ "fini". Por ĝustigi la errajn frazojn oni devas substitui aŭ "plenumi" aŭ "fini" al la verbo "absolvi".

## LA MISUZO DE "RESPEKTIVE" EN ESPERANTO

Bonvolu legi la sekvajn frazojn enhavantajn la adverbos "respektive" aŭ ĝian mallongigon "resp."

- a. "Tre miksaĵajn sentojn vekis en mi la reago de R.M... kiu kontraŭas aperigon de informoj pri esperanto resp. aliaj interlingvoj..." (Heroldo de Esperanto)
- b. "...dank'al ties /la refleksivo/ ekskluziva funkcio reprezenti la subjekton (resp. esprimi la posedantecon de la subjekto)..." (Plena Ilustrita Vortaro)
- c. "Oni foje parolas pri la skolo de Auld en la esperantlingva literaturo respektive beletro." (Monato)

En ĉiu frazo la vorto "respektive" aŭ "resp." staras inter du substantivoj, kiuj rilatas unu al la alia kiel egalvaloraj ebloj aŭ alternativoj. Kutime oni ligas tiajn konceptojn per la kunorda konjunkcio "aŭ". Laŭ Plena Ilustrita Vortaro (PIV) "aŭ" estas uzata por kunigi (1) "du aŭ plurajn vortojn aŭ propoziciojn, inter kiuj eble estas elektitaj", kaj (2) "du vortojn, kiuj estas samsignifaj kaj ekvivalentaj". En la sama vortaro "respektive" signifas "en respektiva maniero", kaj la adjektivo "respektiva" estas difinita jene: "Tia, ke ĝi respondas al unu sola el la priparolataj objektoj, dum aliaj paralele respondas al ĉiu el la ceteraj priparolataj objektoj; propra al ĉiu". La sekvaj citaĵoj ilustras tiun iom komplikan klarigon.

- ĉ. "...norda, suda latitudo montras, ke la koncerna punkto troviĝas resp. norde aŭ sude de la ekvatoro." (PIV)

per la uzo de "respektive" estas klarigita, ke norda latitudo troviĝas norde de la ekvatoro, kaj suda latitudo estas sude.

- d. "Respektive 2 kaj 4 paĝoj pri Esperanta literaturo aperis en la francaj verkoj: Enciklopedio Edma... kaj Encyclopédie de l'Expression..." (Heroldo de Esperanto)

Tie ĉi la 2 paĝoj pri Esperanto estas en la unua menciita enciklopedio kaj la 4 paĝoj aperas en la dua.



- e. "A, B, C respondas respektive al ĉiu el la lateroj a, b, c (t.e. A al a, B al b, C al c)." (PIV)

Post tiu ĉi ĝusta ekzemplo de la uzo de "respektive", sekvas jena rimarko en PIV: "Oni ne uzu tiun adverbbon kun la simpla senco' de "aŭ". Tion oni vidas en frazoj (a), (b) kaj (c), kiuj temas pri alternativoj aŭ ekvivalentoj kaj ne pri paralela interrespondado de preparolataj objektoj kiel en frazoj (ĉ), (d) kaj (e). La erara uzo de "respektive" spegulas etnolingvan kutimon, ĉefe de la germana kaj hungara, en kiuj troviĝas la vortoj beziehungsweise kaj il-letve/illetöleg respektive. Jen frazo montranta, kiel la manko de kompreno pri la uzo de "respektive" en Esperanto ne nur malhelpas komunikadon sed ankaŭ pezigas la stilon en la Internacia Lingvo.

- f. "Tradukado el la ILo en la anglan resp. francan resp. germanan plilongigas la tekston je 21 % resp. 26 % resp. 22 %." (resumaro "Homo kaj Kosmo" en Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft)

Kvarfoje ripetita "resp." en dudekvorta frazo estas troigo. Estas facile simpligi tiun orelagacan frazon.

Traduko el la ILo en la anglan, francan kaj germanan plilongigas la tekston je respektive 21 %, 26 % kaj 22 %.

En la reviziita versio de la frazo unu "respektive" ĝuste lokita diras la samon kiel la kvar disĉemitaĵoj mallongigoj en la originala frazo; la tri lingvoj kaj la tri procent-ciferoj paralele interrespondas en la sama vicordo.

## "D-RINO" AŬ "D-INO" ?

Lastatempe estiĝis pli da interesiĝo pri lingvaj aspektoj de Esperanto rilatantaj al virinoj. Unu el la plej oftaj diskut-temoj koncernas neŭtralan triapersonan pronomon, kiu signifas nek "li" nek "ŝi" sed "li-aŭ-ŝi". Alia propono temas pri la enkonduko de nova prefikso uzebla kun substantivoj kiel "knabo" por doni al la vorto la signifon "knabo-aŭ-knabino". Ĝis nun neniu el la neologismoj akiris la subtenon de la esperantistaj amasoj, do la diskutado daŭros. Dume, oni uzas la tradiciajn lingvajn formojn. En tiu ĉi artikolo mi deziras pritrakti etan demandon, kiu miaopinie estas pli facile solvebla ol la problemo de enkonduko de nova pronomo aŭ prefikso.

Ekzameno de nuntempaj publikigaĵoj en Esperanto indikas, ke estas du manieroj skribi la mallongigon de la vorto "doktorino": (1) d-ino kaj (2) d-rino. Kiu el la du formoj estas pli ĝusta? Listoj de mallongigoj ne troviĝas en ĉiu Esperanta vortaro, kaj eĉ se la vortaristo kompilas ĝin, ofte mankas la virina formo de titolo kun la escepto de la plej oftaj kiel "s-ino", "f-ino" kaj "s-anino". Ekzemple, Plena Ilustrita Vortaro (PIV) diskriminacias kontraŭ inaj membroj de la Akademio de Esperanto, ĉar ĝi registras nur la masklan mallongigon "Ak-ano". Kiel mallongigon de "doktorino" PIV preferas "d-ino", dum Léger kaj Albault en sia franca-Esperanta vortaro registras "d-rino". En la Esperanta-rusa vortaro de E. Bokarev troviĝas ambaŭ formoj; ĉe "d-ino" estas resendo al "d-(r)ino". En la sama vortaro "kemaradino/ k-(d)ino" ilustras du manierojn formi la mallongigon. La Jarlibro de UEA verŝajne preferas "d-rino", almenaŭ por doktorinoj el Hungario kaj Italio, sed elstara escepto estas d-ino Flóra Szabó-Pelső, eks-ĝenerala sekretario de UEA. Tamen, en la revuo Esperanto ŝi estas "d-rino"! Tute anomalia formo de la mallongigo estas "Dr.(ino)", kiun mi trovis nur en periodaĵoj el Hungario.

Mi opinias, ke la formo "d-rino" estas malpli ĝusta, kaj mi provos pruviti tion per preskaŭ matematike rigora rezonado. Oni povas skribi titolojn kaj iliajn mallongigojn en la formo de formulo

Jene: sinjoro : s-ro = sinjorino : s-ino  
kamarado : k-do = kamaradino : k-ino

Tio signifas, ke ekzistas paraleleco inter la masklaj kaj femalaj mallongigoj. La unuaj formiĝas per la inicialo de la titolo + streketo + la lasta konsonanto + la substantiva finaĵo "o". La femala mallongigo enhavas la unuan literon + streketon + la sufikson "-in" + la finaĵon "o". Rimarku, ke mankas la lasta konsonanto de la radikoj. Per analogio la sama procedo donas la ĝustan mallongigon de "doktorino".

doktoro : d-ro = doktorino : d-ino

Ne estas iu ajn kialo uzi la literon "r" en "d-ino", ĉar oni ne skribas "s-rino". Povas esti, ke iu objekto, ĉar "d-ino" povas signifi ankaŭ "delegitino". Kvankam "d." kelkfoje estas uzata kiel la mallongigo de "delegito", laŭ mia vidpunkto tiu unuope litero ne sufiĉas. Pli da literoj estas bezonataj por eviti ambiguecon. Samè kiel oni skribas "dir." por "direktoro", "delegito" devas fariĝi "del."; sekve "delegitino" havas kiel mallongigon "del-ino".

## LA TRADUKO DE PROCESSOR EN ESPERANTO

Ivan Bujdošo, iama komputerikisto ĉe Hungara Esperanto-Asocio kaj eks-sekretario de la Terminologia Sekcio de Scienca Eldona Centro en Budapeŝto, proponis solvi terminologiajn problemojn en la komputeriko per inĝenia laborprincipo. Se mi bone komprenas la metodon, li enmetas anglajn terminojn en komputeron, ŝaltas la aparaton kaj ricevas la ĝustajn Esperantajn ekvivalentojn. Eble la procedo ne estas tiel aŭtomata kaj facila, ĉar li devas ankaŭ enketi ĉe fakuloj pri malfacile solveblaj problemoj.

Leginte respondojn al la demando pri la esperantigo de la angla vorto processor, mi havis la impreson, ke oni ne sufiĉe profunde pritraktis la problemon. La nura trakribado de Esperantaj vortaroj, ĉefe Plena Vortaro kaj Plena Ilustrita Vortaro, por trovi konvenan radikon, ne alportos solvon. Estas necese nun, unu fojon por ĉiam, superrigardi kaj revizii la tutan vortfamilion, al kiu apartenas processor kaj la Esperantaj terminoj proponitaj por traduki ĝin, ĉar ili devenas de parencaj etimoj kaj pro tio havas similajn signifojn. Jen listo, kiu miaopinie estas kompleta, enhavanta ĉiujn vortojn apartenantajn al la vortfamilio devenanta de la latina verbo procedere, kies pasiva participo estas processus.

- A. procedere: 1. proced/i, 2. procedur/o  
B. processus: 1. proces/o, 2. procesi/o, 3. procez/o

La infinitivo procedere estas kunmetita per pro "antaŭ" kaj cedere "iri", "retiriĝi", "cedi". Cedere rilatas al L. cis "cis", Helena hodos "vojo" kaj L. sedere "sidi".

N-ro A-1 kaj A-2 havas kiel etimon la latinan infinitivon aŭ etimlingvan vorton, plej probable francan aŭ anglan, derivitan de la latina verbo. La Esperantaj vortoj B-1 kaj B-2 originas el etimoj bazitaj sur la participo, en kiu la "s"-sono anstataŭas la "d". La "z" en B-3 estas arbitra esperantisma ŝanĝo por diferencigi skribe kaj parole unu el la signifoj de la polisemia "proceso".

Pro simileco de formo kaj signifo tiuj vortoj estas paronimoj (1), kiuj estas evitendaj, ĉar ili malfaciligas la lernadon kaj uzadon de Esperanto. Daŭre aperantaj eraroj en publikigitaj tekstoj atestas, ke esperantistoj ofte misuzas tro similajn vortformojn,

Ĉar ili ne povas elekti la ĝustan vorton bezonatan en la kunteksto. La paro "pesi/pezi" konfuzas eĉ leksikografojn!

La sekvaj Esperantaj terminoj estis proponitaj por traduki processor: procedilo, procezilo, prilaborilo, procesoro, prosesilo. "Procedilo" kaj "procezilo" estas regule pluformitaj surbaze de la jam registritaj radikoj "proced-" kaj "procez-". "Prilaborilo", formita per tri Esperantaj morfemoj, ricevas kiel kunmetaĵo la signifon de processor. Neologismoj estas "procesoro", kies etimo estas processor, kaj "prosesilo", kies unua "s" eĥas la prononcon de la "c" en la A. process. Ne proponita estas "procesilo", plej verŝajne pro la jura kaj anatomia signifoj de la radikoj "proces-".

Komparo de la elektoj kaj objektoj de fakuloj indikas mankon de akordo; efektive, unu nuligas la proponon de alia. Balázs Wacha, lingvisto, malproponas "procezilo" kaj "procesoro" kaj akceptas "prilaborilo" kaj "procedilo". Male, Antal Münnich, komputerikisto, favoras "procezilo" kaj "prilaborilo" sed rifuzas "procedilo" kaj "procesoro". Ĉi-lastan vorton li difinas kiel "oro gajnita per proceso"; tio estas ridindaĵo, ĉar oni kutime ne interpretas Esperantajn vortojn finiĝantajn per "-oro" tiu maniere. Ĉu "kastoro" estas "oro gajnita de kasto"? Ĉu "pastoro" estas "oro preparita el pasto"?

Ŝajnas, ke la sola termino, kiu rezistas al kritiko, estas la kunmetaĵo "prilaborilo", kies signifo estas tiel ĝenerala, ke ĝi estas facile uzebla en pluraj kunteksto sen kaŭzi konfuzon pro paronimeco aŭ polisemio. Pluformado ne estas problemo, kaj oni povas diri "mikroprilaborilo" anstataŭ "mikroprocesoro". Mi mem malaprobas la alprenon de novaj radikoj kiel "procesor-" kaj "proses-", ĉar ili nur pligrandigas la nombron de paronimoj.

Mi opinias bizara kaj rifuzenda la proponon de Balázs Wacha uzi la "abreviaturon" CoPo (Centra Procedilo) kaj pluformi kriptajon kiel "cop(um)i", "copado" kaj "encopigi". Tiajn vortformojn oni povas enkonduki en sciencfikciaĵojn sed ne en seriozan sciencan verkon.

Nota 1: Vidu mian artikolon "La problemoj de paronimoj en Esperanto" (Paco, 1978, vol. 25, n-ro 3, pĝ. 10-11), represitan en la unua kolekto de miaj artikoloj pri lingvaj demandoj, Margene de la Lernolibro (1982, Budapeŝto, pĝ. 17-22).

## RIMARKOJ PRI PUŜA STILO EN ESPERANTO

Lernolibroj kutime ne pritraktas la manieron akiri bonan stilon en la skriba lingvo. Tio fariĝas kurstemo nur en la instruado de Esperanto al progresintoj aŭ en specialaj seminarioj por tiuj, kiuj jam primajstris la gramatikon kaj deziras apliki sian scion de Esperanto por verki beletraĵojn. Se iu devas du-tri fojojn legi frazon por kompreni ĝin, aŭ lia lingvoscio estas mankhava rilate gramatikon kaj vortprovizon, aŭ la frazo mem estas fuŝe verkita. Jen ekzemplo ĉerpita el internacia periodaĵo.

"...la teologo jen ricevas duan pliriĉigon per ĉi tiu verko, kies bazo estas malneto, lasita de la meze de sia laboro kruele forŝirita Esperanta teologo G. Rust." (Esperanto)

La dua difina artikolo "la" rilatas al "Esperanta teologo...", sed ses vortoj apartigas tiujn du elementojn. Por plibonigi la stilon de la frazo kaj samtempe plifaciligi ties komprenon, oni devas re-verki ĝin tiel, ke "la" staras tuj antaŭ "Esperanta teologo...". Jen mia propono.

"...la teologo jen ricevas duan pliriĉigon per ĉi tiu verko, kies bazo estas malneto, lasita de la Esperanta teologo G. Rust, kruele forŝirita meze de sia laboro."

Kvankam la originala frazo estas gramatike ĝusta, la misaranĝo de la partoj de la frazo faris ĝin malfacile komprenebla je la unua legado.

Ankaŭ gramatike eraraj frazoj stumbligas legantojn, kiuj ne nur devas relegi la frazon sed ankaŭ analizi ĝian konstruon por scii, pri kio temas. Jen teksto de reklamo.

"Turnante la ŝut-diskon ĉirkaŭ siaj horizontala kaj vertikala aksoj, eblas disŝuti ekzemple sub sia veturilo, aŭ precize alŝuti sur malvasta zono, ekz. sur vojrandoj." (Hungara Vivo)

Tie ĉi la verkinto pekis ne nur kontraŭ la bona stilo sed faris ankaŭ gramatikajn erarojn rezulte de sklava traduko de la hungara originalo. La sola finitiva verbo en la frazo estas "eblas", sed ĝi ne havas personan subjekton, al kiu povus rilati la adverba participo "turnante". En Esperanto adverba participo ne povas esti uza-

ta absolute. Ĉar mankas subjekto, ne pravigebla estas la uzo de la du refleksivaj adjektivoj "siaj" kaj "sia". Por plibonigi tiun frazon stile kaj gramatike, oni reverku ĝin jene.

"Kiam la ŝut-disko estas turnata ĉirkaŭ siaj horizontala kaj vertikala aksoj, eblas disŝuti ekzemple sub la veturilo, aŭ precize alŝuti sur malvasta zono, ekz. sur vojrande."

Unu el la plej bonaj manieroj kontroli la stilan kvaliton de verko estas voĉlegi ĝin. Se oni povas fari tion flue, sen hezitoj por pensi pri la signifo de vortoj aŭ frazoj, la stilo estas bona. Male, se oni devas halti por enspiri aŭ cerbumi, tio indikas, ke la frazoj estas tro longaj aŭ tro komplikaj. Du trajtoj estas nepre bezonataj, por ke la stilo estu bona: tuja komprenebleco kaj maksimuma esprimkapablo. Ili estas akireblaj nur post longa kaj intensa ekzercado.

Kiam mi lernis la francan lingvon en la mezlernejo, mi legis en unu el miaj lernolibroj la sekvan saĝan veraĵon: se ĝi ne estas klara, ĝi ne estas franca. Iomete modifante tiujn vortojn, oni povas diri la saman pri Esperanto: se ĝi ne estas klara, ĝi ne estas bona Esperanto.

# KIU UZAS "SLAVISMOJN" EN ESPERANTO?

En Bulgara Esperantisto (4/1983, pĝ. 11) Ljubomir Miĥajlov re-  
futas aserton de István Nagy (Budapeŝta Informilo, 8/1982), ke cer-  
ta vortordo estas nelogika. L. Miĥajlov prave karakterizas tiun lin-  
gvouzon kiel stilan trajton de slavaj lingvoj kaj montras, ke la  
hungara esperantisto misinterpretis unu el la ekzemplaj frazoj, ki-  
ujn li ĉerpis el Bulgara Esperantisto. Eĉ se tiu vortordo estas ne-  
kutima al parolantoj de kelkaj lingvoj, tio ne signifas, ke la enha-  
vo estas nekomprenebla aŭ miskomprenebla. Povas esti, ke iuj legan-  
toj devas du-tri fojojn legi tiajn frazojn, sed ili apenaŭ estas  
nelogikaj pro tio. L. Miĥajlov detale pritraktas tiun aspekton de  
la argumentado de I. Nagy. Tie ĉi mi deziras substreki alian era-  
ron en la prezentado de la kritikanto, ĉar li diras, ke temas pri  
slavismo, t.e. karakteriza apartaĵo de la slava lingvogrupo. Sendu-  
be tiu vortordo ofte troviĝas en verkoj de esperantistoj, kies ge-  
patra lingvo estas unu el la slavaj lingvoj, sed ĝi ne estas uzata  
ekskluzive de slave parolantaj. Jen kelkaj citaĵoj ĉerpitaj el ler-  
nolibro verkita de germanlingvulo.

1. "Vi sentis ŝian emberason kaj invitis ŝin ludi kun vi,  
por ke ŝi sentu sin pli bona kaj almenaŭ de unu el ni  
akceptita."

Pli rekta esprimmaniero estas: "...ŝi sentu sin pli bona kaj akcep-  
tita almenaŭ de unu el ni."

2. "Tamen je militfino Moses Kaver eksciis, ke ĉiuj liaj  
iamaj sklavoĵoj malaperis, escepte de pro kokluŝo severe  
malsana knabo..."

Inter "escepte de" kaj "knabo" venas kvar vortoj, kiuj pli ĝuste  
devas sekvi "knabo" jene: "...escepte de knabo severe malsana pro  
kokloŝo..."

3. "...prefere ligu ilin per en gluon trempitaj ŝtofstrioj."

Cni atendas post la prepozicio "per" substantivon indikantan la a-  
ĵon, kiun oni uzu por ligado, sed interrompas tiun sinsekvon prepo-  
zicio kun alia substantivo. Cni reverku la frazon, por ke "ŝtofstri-  
oj" tuĵ sekvu "per": "...prefere ligu ilin per ŝtofstrioĵ trempi-  
taj en gluon." (Rimarku: estas pli ĝuste diri "en gluo".)



Ni daŭrigu nian esploron pri tiu ĉi "slavismo". Ne nur germane parolantaj homoj skribas kiel slavo; ankaŭ parolantoj de la hungara lingvo same pekas. Estas ja strange, ke I. Nagy preteratentis tiun stilan malglataĵon de la hungara dialekto de Esperanto. Ekzemploj kiel la sekvaj abundas en ĉiuj publikigaĵoj.

4. "...li vivtenis sin en fabriko, sed firme rifuzis logajn invitojn de aristokratoj, iĝi arme-komandanto favore la tronon reokupi deziranta eksreĝo Karlo la 4a." (Hungara Vivo)

Ĝustigo: "...favore la eksreĝo Karlo la 4a, deziranta reokupi la tronon.

5. "La homo...eĉ ne pensas...ke laŭ la kreanta laboro kaj en futuron montrantaj planoj de J. Beszédés ekiris la naturon transformanta lukto kun la fortoj de la spitema naturo." (Hungara Vivo)

Drasta reverkado estas bezonata: "...laŭ la kreanta laboro J. Beszédés kaj liaj planoj montrantaj en futuron, ekiris la naturtransforma lukto kun la fortoj de la spitema naturo."

6. "Tial ŝajnas dankinda tiu ĉi detala, tamen ne tre longa informo, kiu malkovras multajn interesajn flankojn de la antikvajn trajtojn ankoraŭ gardanta popolo." (Hungara Vivo)

Inter la natura sinsekvo "la...popolo" staras kvar vortoj, kiujn oni metu poste: "...la popolo ankoraŭ gardanta antikvajn trajtojn."

Estas evidente, ke I. Nagy ne scias, ke lia samlandano, Kolomoŝ Kalocsay, antaŭ du jardekoj okupiĝis ĝuste pri tiu ĉi stila fenomeno (vd. "Lingva Rastado", Hungara Vivo, 4/1964, pĝ. 15-16). Li skribas pri vortordo "ĉe la suplementitaj epitetoj, kiu ekzistas nur en la hungara kaj germana lingvoj, sed estas fremda al ĉiuj lingvoj aliaj." Kalocsay ĝustigis kelkajn frazojn, same kiel mi faris ĉi-supre, kaj aldonis jenan konsilon: "Oni devus sin teni al la regulo, ke post "la" staru ĉiam "peza" vorto, t.e. substantivo, adjektivo aŭ adverbo, sed neniam prepozicio, ĉar tiam la kompatinda "la" pendas iel en la aero, ne sciante, kien ĝi propre apartenas." Finante sian artikolon, li klarigas, ke en liaj ĝustigitaj frazoj "ĉiu frazelemento staras apud tiu, al kiu ĝi senpere rilatas. Kaj ĝuste tio faras la parentezajn strukturojn malpli pezaj kaj pli fa-

cile kompreneblaj, eble eĉ por hungaro kaj germano."

Estas rimarkinde, ke Kalocsay tute ne atribuas mallogikecon al tiaj frazoj kaj eĉ ne karakterizas ilin kiel slavismojn!

# ANKORAŬ UNU MALSANO DE ESPERANTO - LA LATINISMO

Antaŭ kvaronjarcento aperis la pensinstiga libro de Akademiano H.A. de Hoog titolita Du Malsanoj en Esperanto, temanta pri la "kia-ismo" kaj la "tiom-kiom-ismo". En tiu ĉi eseo mi deziras pri-trakti alian aspekton de la verdlingva patologio - la morbon, kiun mi nomas la latinismo. Laŭ Plena Ilustrita Vortaro (PIV) la sufikso "-ism" povas esti uzata ankaŭ por esprimi staton de toksigo, ekzemple "alkoholismo". Mi difinas la latinismon kiel staton de lingva veneniĝo en Esperanto. Rezulte de miaj esperantologiaj esploroj pri la aktuala karaktero de Esperanto, mi rimarkis, ke unu el ĝiaj anakronismaj, eĉ nekonsekvencaj, trajtoj estas la uzado de la latina lingvo en la formo de izolitaj vortoj, kliŝaj esprimoj kaj proverboj por garni alie senriproĉajn tekstojn. Ni analizu la diversajn formojn, en kiuj la latinismo manifestiĝas.

Unue, estas necese escepti la sansn uzon de la latina lingvo por pravigeblaj celoj, kiel montras la lastatempe aperinta furora bildstria libro Asteriks la Gaŭlo. En ĝia lerte tradukita kaj sprita Esperanta teksto troviĝas pluraj latinaj vortoj kaj esprimoj el-buŝigitaj de romiaj soldatoj kaj provincaj funkciuloj en Gaŭlujo. "Vae victis" ĝemas unu el la legianoj, kiu ĵus ricevis kapbatadon. Alia trupano eldiras "Alea jacta est", tiel ripetante la famajn vortojn de Julio Cezaro, kiam li transiris Rubikonon. "Morituri te salutant!" elsputas rikananta romia armeano, eĥante la saluton de la gladiatoroj irontaj en la arenon. Ankoraŭ unu juvela esprimo, "Vanitas vanitatem et omnia vanitas" apenaŭ konvenas sur la lipoj de pagana soldato; ĝi fontas el la Malnova Testamento (La Predikanto, 1:2). Efektive, la uzo de iom da latino en la kunteksto de rakonto pri okazintaĵoj dum la romia periodo efikas bone, ĉar ĝi servas por doni lingvokoloron al la paroloj de la romiaj rolantoj. Krome, ĉiu latina esprimo havas Esperantan tradukon en la formo de piednoto.

Tute mala estas la impresoj, kiun oni ricevas, kiam latinaj lingvaj elementoj estas larditaj en alispecaj Esperantaj tekstoj, simple ĉar kelkaj esperantistaj verkantoj sentas bezonon imiti siajn etnolingvajjn kolegojn. La emo uzi tian lingvaĵon, kiun mi nomas "latinsperanto", ne limiĝas al literaturaj verkoj aŭ erudiciaj studaĵoj, sed infektas ankaŭ la privatan korespondadon. Jen tri ekzemploj ĉerpitaj el leteroj, kiujn mi ricevis dum la pasintaj jaroj.

1. Eminentia movadano, klarigante al mi, kiel oni devas alproprigi la Internacian Lingvon, skribis: "...sed la unua paŝo komenciĝas "ab ovo" je la eklerno de la bazaj koncoj de Esperanto..."

2. Mi atentigis budapeŝtanojn pri grava morfologia eraro en vorto en unu el liaj leteroj. Returnpoŝte li senkulpegis sin per tiu ĉi antikva diraĵo: "Etiam aliquando dormitat bonus Homeros." Bela preteksto per klasika teksto!

3. Okaze de perletera polemikado kun alia ĉefurba hungara esperantisto, tiu ĉi emocie jetis al mi jenan plenuŝon da vortoj: "Roma locuta, causa finita."

Ni nun rigardu, kiel tiu ĉi ĉefa simptomo de latinsperanto aperas en verkoj eldonitaj en Hungario. Mi elektis ne malnovajn verkojn de la 19-a jc., kiam la latina lingvo estis pli vaste instruata kaj konata, sed nuntempajn periodaĵojn kaj librojn.

4. "Mi mem tre bone scias, ke neniu rajtas deklari sin kompetenta elpensi kaj kvazaŭ ex cathedra publikigi ian ajn faklingvon Esperantan." (Hungara Vivo, 1970/4)

5. "La preciza familestro zorgis ankaŭ pri "corpus delicti." (Hungara Vivo, 1973/2)

6. "Post unu jaro ree estos kongreso! Spiro spero!" (Hungara Vivo, 1975/3)

7. "...nia konkreta propono estas, ke la kultura komitato... fondu "ad hoc"-subkomisionon..." (Hungara Vivo, 1976/6)

8. "...ĉiuj lingvoj estas specialaj sistemoj, suverenaj, sui generis strukturoj..." (Esperantologiaj Kajeroj, 2, 1977)

9. "Esperanto estas ipso facto pli ol nura lingvo." (Hungara Vivo, 1978/3)

La verko Maskerado ĉirkaŭ la Morto de Teodoro Schwarz (Tivadar Soros) spegulas la poliglotecon de la aŭtoro, kiu salis kaj pipris sian Esperantan tekston per vortoj kaj esprimoj ne nur el la latina lingvo sed ankaŭ el la helena, hebrea kaj pluraj modernaj lingvoj. Speciala tabelo fine de la libro ŝparas al legantoj la taskon konsulti vortarojn por kompreni tiun fremdlingvan balaston. Jen tri ekzemploj.

10. "La sorto decidis anstataŭ ni kiel deus ex machina."

11. "Tiujn mi rigardis jam ab ovo nefidindaj."

12. "Kia inversio in peius dum longaj dek jaroj..."

Por montri, ke latinsperanto ne estas apartaĵo nur de la esperantistoj el Hungario, la sekvaj ekzemploj venas de pli diversaj fontoj.

13. "Plue interesas, kiom planlingvo kiel Esperanto taŭgas kiel "tertium comparationis" por la sinkrona lingvokomparado." (Esperanto - La Internacia Lingvo - Sciencaj Aspektoj)

14. "Quo vadis teatro?" (Kulisoj Internaciaj)

15. "S-ro Weide dixit!" (Dialogo)

16. "Tial ke ex oriente hostes, oni imagu ke morgaŭ la mongoloj atakos Italion." (Literatura Foiro)

17. "Ĉiujare ŝanĝiĝas la prezidanto laŭ alfabeto ordo de respublikoj kaj provincoj sur bazo "primus inter pares"... " (Monato)

Antaŭ ol pritrakti la kaŭzon de la emo pezigi la stilon de Esperanto per latinaĵoj, estas utile distingi inter la ekzemploj de latino ĉi-supre cititaj kaj du aliaj aspektoj de la klasika romia lingvotrezoro, kiun heredis ne nur Esperanto sed ĉiuj lingvoj en la sfero de la Okcidenta Civilizo. Temas pri alia speco de latinismo kaj Esperantaj nomoj de latinaj kulturaj apartaĵoj.

Latinismo en Esperanto ĉi-kuntekste havas alian signifon. Laŭ la klasifiko de I. Szerdahelyi (1976a, pĝ. 140) ili estas esprimoj kiel "nerona festeno", "herkulesa tasko", "lukulusa regalo" ks., kiuj apartenas al la eŭropa kulturmedio... kaj estas... tute fremdaj kaj nekomprenblaj ekz-e por azianoj." Same granda malfacilaĵo estiĝas pro la uzo de latindevenaj vortoj, kiuj rilatas al apartaĵoj de la romia popolo kaj kulturo. Aliverke Szerdahelyi klarigas, ke tiuj lingvaj apartaĵoj "ne estas Esperantaj vortoj, nur Esperantaj formoj de la etna vorto: ilin oni ne tradukas Esperanten, sed interpretas ilin. Sen interpretado komprenas ilin nur membroj de tiu etna kulturo, al kiu ili apartenas." (Szerdahelyi, 1976b, pĝ.17). El pluraj latinaj apartaĵoj registritaj en PIV, jenaj tri ilustras tiun ĉi vortspecon.

- a. koloseo: "kolosa amfiteatro en Romo, kies grandiozaj ruinoj plu staras
- b. matrono: "nobela patrino en la antikva Romo"

c. sesterco: "arĝenta, poste bronza monunuo en Romo"

Ĉar latinismoj kaj latinaj lingvaj apartaĵoj estas utilaj, ili estas asimilitaj en Esperanto. Tion oni ne povas diri pri la neasimilitaj latinaĵoj. Kial, do, ili estas uzataj? Estas rimarkinde, ke ekzistas nur unu alia fremda lingvo, kiu funkcias paralele kun la latina en Esperanto: la angla. Tiun fenomenon mi jam ekzamenis en aparta studaĵo (Golden, 1980 kaj 1982). Estas facile kompreni, kial la angla lingvo, la plej vaste internaciskale uzata lingvo nuntempe, povas trudi sin al Esperanto, same kiel ĝi faris al pluraj aliaj lingvoj tra la tuta mondo - sed kial ankaŭ la latino, lingvo de formalaperinta civilizo? Kian povon aŭ sorĉon ĝi ankoraŭ havas por meriti lokon en verkoj, kies lingvo celas funkcii kiel la internacia lingvo? Tri kialoj prezentiĝas.

a. Neebleco traduki ĉion en Esperanton. Iuj asertas, ke ekzistas esprimoj tiel gravedaj je etnokultura enhavo kaj tiel sukplene signifaj, ke ili defias tradukon. Sekve, ne estas alia rimedo ol uzi ilin en la etnolingva formo kaj lerni la signifon. Unu el la plej elstaraj esperantistoj de la 20-a jc. rifuzas la argumenton de netradukebleco.

"Tiu opinio estas tute erara. La internacia karaktero de Esperanto ebligas adekvatan esprimadon de ĉiuj apartaĵoj, entenataj en ĉiu unuopa nacia lingvo. Tio, fakte, signifas, ke ĝi estas multe pli riĉa ol kiu ajn nacia lingvo. Ĉio, kion oni povas diri en la naciaj literaturaj lingvoj, oni povas esprimi ankaŭ en la Internacia Lingvo. Male, la apartaĵoj de unu nacia lingvo tre ofte ne estas adekvate esprimeblaj en alia nacia lingvo." (Lapenna, 1971, pĝ. 114-115)

Se esperantistoj ne tutkore akceptas tiun ĉi vidpunkton, ili neniam sukcesos venkigi Esperanton.

b. Internacieco de la latina lingvo. Apogantoj de la latino supozas, ke ĉiuj edukitaj homoj komprenas (aŭ devus kompreni) tiun lingvon. En tiu ĉi rezonado kaŝas sin la erara opinio, ke la latina lingvo ankoraŭ povas funkcii kiel internacia kulturlingvo. Se tio estas vera, kial je la diablo oni okupiĝu pri Esperanto? Fakte, tiu argumento estas evidente senbaza. La latino jam de longe ĉesis funkcii kiel internacia komunikilo, kaj pro tio ĝi jam ne estas deviga studobjekto ĉie. Ĉiam malpli da homoj lernas ĝin, kaj latinaĵoj por ili estas nur enigmoj.

c. Snobeco. Tiu ĉi trajto - bedaŭrinde universala - klarigas, kial la latina kaj la angla lingvoj sukcesis invadi Esperanton. Snoboj, sciante eble nur kelkdekojn da vortoj el ambaŭ lingvoj, ŝatas superŝuti siajn leterojn kaj skribaĵojn per fremdaj esprimoj, senkonsidere ĉu ĉiuj legantoj komprenos ilin. Ili amuziĝas per la mistifikado kaj strebas imponi per pseŭdoerudicio, paradigante fremdajn vortojn sur la paĝoj de siaj verkoj. Estas ja paradokso: oni lernas internacian lingvon por faciligi interkomunikiĝon kun aliaj homoj sed samtempe uzas specon de kaŝlingvo por bremsi aŭ neŭtraliĝi la lingvobaril-roman efikon de Esperanto. Ne senmotive G. Waringhien (1959, pĝ. 427) karakterizas la hodiaŭan citadon de fremdlingvaj frapfrazoj "humanista manio" kaj "ia ridinda trajto". Tiu eksprezidanto de la Akademio de Esperanto ja scias pri kio temas, ĉar li mem ofte blindumas legantojn per sia ege polurita klasika dokteco.

Kiu ankoraŭ ne estas konvinkita pri la kontraŭkomunika obakureco kaj stila pezeco de latinsperanto, provu traduki la latinaĵojn cititajn ĉi-supre. Kiu dum legado hezitas kaj stumblas, kaj miskomprenas la enhavon, certe ĉagreniĝos pro komplekso de lingva malplivaloro, ĉar li konstatos, ke latinsperanto estas lingvo por la elito, ne por ordinaruloj.

### Konsultitaj verkoj

Bernard GOLDEN

1980. La uzo de la angla lingvo en Esperanto. La Brita Esperantisto. Majo-aŭgusto; 835: 346-348.

1982. La uzo de la angla lingvo en Esperanto. Pĝ. 55-58 en Marĝene de la Lernolibro, Budapeŝt; Hungara Esperanto-Asocio.

GOSCINNY kaj UDERZO

1979. Asteriks la Gaŭlo. Stuttgart.

Ivo LAPENNA

1971 Retoriko. Tria eldono. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio

PLENA ILUSTRITA VORTARO (PIV)

1970 Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris.

Teodoro SCHWARZ (Ŝvarc)

1965. Maskerado ĉirkaŭ la Morto. La Laguna, Hispanio: J.Régulo.

István SZERDAHELYI

- 1976a. La semantika modelo de Esperanto. Pĝ. 85-152 en Internacia Interlingvistika Simpozio, Kumrovec, 1975. Zagreb.
- 1976b Skizo pri morfemiko de Esperanto. Sciencaj Komunika-  
ĵoj; 11-24. Budapest.



# KONTRIBUAĴO AL LA DIALEKTOLOGIO DE ESPERANTO: LA ESTIĜO DE "HUNGARSPERANTO"

En Heroldo de Esperanto (n-ro 1650, 1979, pĝ. 3) aperis artikolo de la konata hungara komputerikisto Antal Münnich, kiu lamentas pri la reformita "dialekto" de Esperanto, kiun li malkovris en Plena Ilustrita Vortaro (PIV). Oni ja povas diskuti kun s-ro Münnich pri la ĝusteco de la termino "dialekto" aplikita al la ekzemploj, kiujn li ŝerpis el tiu elstara leksikografia verko, kiu tamen ne estas oficiala publikigaĵo. Ŝajnas al mi, ke li iom troige kaj kun mallarĝa vidpunkto kritikis kelkajn punktojn. Aliaj esperantologoj sendube povas defendi la lingvouzon en PIV, precipe rilate la dornhavan demandon pri neologismoj. Mi deziras en tiu ĉi artikolo atentigi Münnich pri pli bona ekzemplo de Esperanta dialekto, kiu kreskas ĝuste sub liaj propraj piedoj en la hungara provinco de Esperantujo, kaj kiu estas pli granda minaco ol la "dialekto" de PIV.

Malamikoj de la ideo de internacia lingvo ofte argumentas, ke post iom da tempo ankaŭ tiaj lingvoj disfalos en dialektojn same kiel etnolingvoj. Male, apogantoj de internaciaj lingvoj insiste provas montri, ke tio ankoraŭ ne okazis, kaj fakte neniam okazos. Tamen, kion diri, kiam eksvarmas en la Esperanto de granda nombro de personoj nekutimaj gramatikaĵoj, vortformoj kaj signifoj spegulantaj la influon de ilia gepatra lingvo? Temas pri "hungarsperanto", la hungara dialekto de Esperanto.

Mi ne estas la malkovrinto de tiu lingvaĵo. Jam antaŭ dudek jeroj Kolomano Kalocsay, uzante ekzemplojn el siaj propraj verkoj, reliefigis la ekziston de hungarismoj karakterizantaj la lingvouzon de madjaraj esperantistoj (Kalocsay, 1963, 1964). Unu jardekon poste, alia eminenta hungara esperantisto, Tibor Ujlaky-Nagy, avertis kontraŭ la plua disvastiĝo de la hungara dialekto de Esperanto (Ujlaky-Nagy, 1973).

"Hungarsperanto" plej orelagace manifestiĝas en la parola lingvo, donas apartan malbonguston al la stilo de leteroj kaj makulas la paĝojn de ĉiuspecaj hungarlandaj eldonaĵoj. Ĉi-sube mi prezentos ekzemplojn de la plej karakterizaj dialektaĵoj, kiuj devias de

la internacia uzo de Esperanto. La tipaj misaĵoj estas ilustritaj per citaĵoj venantaj el la revuo Hungara Vivo, la bulteno Budapeŝta Informilo, kaj aliaj publikigaĵoj. Verkis ilin homoj, kiuj jam ne estas lernantoj en Esperantokurso por komencantoj. Cetere, estas cerbŝoka kaj animskusa fakto, ke kelkaj eraroj venas el verkoj de instruistoj - jes - profesiaj instruistoj de Esperanto, diplomitaj ĉe la Universitato en Budapeŝto!

Unu el la oftaj prononceraroj, kiu sukcesis enŝteliĝi en la skriban lingvon, estas la substituo de "z" al "s". Troviĝas en presitaj tekstoj "kurzive", "tranzitiva", "kozmpolitaj" kaj "inverzio" anstataŭ la ĝustaj formoj "kursiva", "transitiva", "kosmpolitaj" kaj "inversio".

Kvankam la difina artikolo ekzistas en la hungara lingvo, ĝi ne estas uzata sammaniere kiel en la norma Esperanto. Tamen, parolantoj de la hungara dialekto de Esperanto uzas ĝin laŭ la hungaraj reguloj. En la sekvaj ekzemploj la difina artikolo antaŭ la propraj nomoj "Marso" kaj "Broadway" estas superflua: (a) "Jam komenciĝis ankaŭ la esplorado de kelkaj planedoj de la sunsistemo, precipe la Marso kaj Venuso..."; (b) "Solenado de Kossuth sur la Broadway en Novjorko".

Anstataŭ uzi la akuzativan kazon post transitivaj verboj kiel "adiaŭi", "demandi" kaj "timi", adeptoj de "hungarsperanto" enŝovas la prepozicion "de" inter la verbon kaj la objekton, tiel imitante la uzon de substantivo kun ablativa sufikso en la hungara lingvo. Anstataŭ diri "ni adiaŭas de eminenta homo", "ni demandas de vi" kaj "tiuj homoj timas de tio", oni diru "ni adiaŭas eminentan homon", "ni demandas vin", kaj "tiuj homoj timas tion".

"Tra-" kiel prefikso estas daŭre misuzata, kiam en la kunteksto ĝi evidente devas esti "re-": "El ties ŝtonoj oni konstruis la romanikan prapreĝejon, kiu poste estis trakonstruita barokstile..." Temas pri diversaj konstruperiodoj, kiam la preĝejo estis rekonstruita ankoraŭfoje laŭ nova stilo.

En "hungarsperanto" ofte aŭdiĝas frazoj kiel: "Komence la ribelistoj akiris kelkajn venkojn, ĝis estis disbatitaj de la feŭdaj fortoj..." En Esperanto oni ne rajtas ellasi la subjektajn pronomojn en kompleksa frazo kunligita per suborda konjunkcio, eĉ se la subjekto de ambaŭ propozicioj estas la sama. Oni diru: "...ĝis ili estis disbatitaj...".

Alia ofta eraro estas la ellaso de la subjekto de certaj verboj, ĉar en la hungara lingvo la respondataj verboj (kell, sikerŭl) ne havas subjekton, kaj la persono estas indikita per dativa konstruo: "La vetero ne favoris al la turistoj, tamen sukcesis promeni dum horoj en la pitoreska valo." Por ĝustigi tiun ĉi laman frazon, oni diru "...ili sukcesis promenadi...".

Polisemiaj (plursignifaj) hungaraj vortoj estas intermiksita tradukitaj en la hungaran dialekton de Esperanto: "Kiam ĉi vicoj aperos, s-ro Demeter, la inĝeniero, jam estos pensiulo." La hungara vorto sor signifas kaj "vico" kaj "linio". En la kunteksto de la citita frazo "linioj" estas la ĝusta vorto.

"Hungarsperantistoj" ofte kreas dialektajn vortojn per traduko de la morfemoj formantaj hungaran vorton: "Forsonis la biografio...de Zamenhof." Oni volas diri, ke iu prezentis prelegon pri la biografio de Zamenhof. "Forsoni" estas verbo miskreita per la traduko de el- ("for-") kaj hangzik ("sonas"), kiuj aperas en la verbo elhangzik. Pluraj tiaj "hungarsperantaj" vortoj troviĝas en la hungara kaj Esperanta vortaro de A. Pechan, sed ili ne estas registritaj en aliaj Esperantaj vortaroj. Tio estas certa indiko de ilia hungarisma karaktero. Kompreneble, tiaj kunmetaĵoj tute ne ĝenas parolantojn de la hungara lingvo, ĉar ili simple retradukas ilin hungaren!

La malbona stilo de "hungarsperanto" rezultas de sklava sekvo de la vortordo de la hungara lingvo, ofte kun misloko de akuzativoj, tiel donante al la Esperanta teksto fremdan aspekton. Kelkfoje la frazoj fariĝas kaprompaj enigmoj, kaj oni devas legi ilin du aŭ tri fojojn por kompreni la enhavon. Jen tipaj ekzemploj: (a) "...venas la ĉiam interesajn artikolojn publikanta OOMOTO..."; (b) "La produktema vivo de la alia...inĝeniero...atestas individuon simile ageman, estonton formantan, kreantan."; (c) "Iras jam la eksperimentoj kaj la esploroj, ke helpe de pli bona elekto de la aĝo de edukitoj, ĉu estus skirebla pli efika fremdlingva instruado."

La plej hungareca aspekto de la hungara dialekto de Esperanto estas esperantigitaj idiomaĵoj, kiuj estas kompreneblaj nur, se oni scias la hungaran lingvon. Tiuj idiomaĵoj povas konsisti el vorto aŭ frazero. Ekzemple, kion povas signifi "pargetdancisto" en jena citaĵo: "Kaj kiam mia ĝentila, sed firma deziro foririgis el mia domo ankaŭ la pargetdanciston, eĉ kun mia edzino restariĝis la pa-

co." Nenio en la kunteksto antaŭ aŭ post tiu ĉi frazo indikas, ke temas pri dancisto, eĉ iu, kiu dancas sur pargeto. Por komenci la deĉifradon, oni retraduku "pargetdancisto" en la hungaran lingvon. La rezulto, parkett-táncos, estas difinita en la malgranda turista vortaro de A.Pechan kiel "profesia dancisto". Oni devas konsulti pli grandan hungaran vortaron por ekscii, ke alia signifo de la hungara termino estas "ĝigolo". Tiu formo faras komprenebla la cititan frazon.

Estas eble daŭrigi la prezentadon de ekzemploj de "hungarsperanto" ĝis enuigo. Konklude, estas substrekinde, ke tiaj pekoj kontraŭ la pureco de nia lingvo, venantaj el la buŝoj kaj plumoj de loĝantoj en unu parto de Esperantujo, eble riskos la apartigon es-tontece de tiuj samideanoj disde aliaj pro malfacile komprenebla dialekto. Estas necesa la kunordita agado de instruistoj, verkistoj, redaktoroj kaj leksikografoj por konformigi la hungaran variaĵon de Esperanto al internaciaj normoj kaj elradikigi ĉiujn hungaris-mojn sur ĉiuj niveloj de la lingvouzo. Inter tiuj lingvogardantoj estu ne nur hungare parolantoj, sed ankaŭ alilingvuloj. Hungaro, kiu revizias Esperantajn tekstojn verkitajn de aliaj hungaroj, ne ĉiam sukcesas elsarki la hungarismojn. Preskaŭ ĉiu esperantlingva eldonaĵo verkita aŭ redaktita de hungaroj pravigas tiun aserton.

#### Konsultitaj verkoj

Kolomano Kalocsay: Hungarismoj en Esperanto. Hungara Vivo, 1963, n-ro 1, pĝ. 20-21.

Lingva rastado. Hungara Vivo, 1964, n-ro 4, pĝ. 15-16.

Tibor Ujlaky-Nagy: Gramatika paĝo. Budapeŝta Informilo, 1973, n-ro 9, pĝ. 10-11.

## ĈU PERVOJISTOJ CELAS REFORMI ESPERANTON ?

Antaŭ kelkaj jaroj mi ricevis ekzempleron de Esperanto-Fervo-disto, la oficiala organo de Association Française des Cheminots pour l'Espéranto - APCE (Franca Fervojista Esperanto-Asocio). La nomo kaj adreso de la sendinto ne estis sur la banderolo, sed la poŝtstampo indikis, ke la periodaĵo estis enpoŝtigita ne en Parizo, la sidejo de la organizaĵo, sed en Mulhouse, Francio. Interne de la bulteno, kvazaŭ aldonaĵo, troviĝis kelkaj cirkuleroj pri la reformprojekto de Esperanto nomata Optimala Esperanto-Ortografio (OEO), kies aŭtoro estas Albert Lienhardt el Mulhouse.

La reformproponoj de s-ro Lienhardt temas pri la malutilo de la supersignitaj literoj en la Esperanta alfabeto. Lia fundamenta punkto estas, ke se ili ne ekzistus, tiam pli da homoj volonte lernus la lingvon, kaj sekve, oni vastskale uzus ĝin, eldonus pli da verkoj en ĝi, kaj finfine, eĉ oficialigus ĝin.

Se oni ekzamenas profunde kaj objektive la demandon pri super-signoj en Esperanto, oni povas lerni interesan lecionon. Ekde la apero de la zamenhofa lingvo, leviĝis protestoj kontraŭ tiuj literdistingiloj. Ortografiaj reformprojektoj venis kaj iris kiel la vento, kaj neniu el ili havis eĉ la plej malgrandan efikon sur la klasikan Esperanton. La argumentoj kontraŭ la uzo de diakritaj signoj en Esperanto estas tute senbazaj kaj rezultas el manko de serioza pripensado.

En la centjara historio de Esperanto, ĉiuj proponoj por reformoj, sen iu ajn escepto, fiaskis dank'al la komuna saĝeco de la esperantistaro, kiu ne permesis, ke lingvaj plibonigistoj tuŝaĉu alian lingvon. Erara, do, estas la aserto de la aŭtoro de OEO, ke la ĉapelitaj literoj faras Esperantlingvan presadon kaj eldonadon malpraktika kaj malekonomia. Sur miaj librobretoj staras malnovaj kaj novaj verkoj en Esperanto kun la kolofonoj de prestiĝaj neesperantistaj eldonejoj el Parizo, Londono, Oksfordo, Nov-Jorko kaj Budapeŝto. Tiuj gravaj mondkonataj firmaoj ne elspezas monon por akiri supersignitajn litertipojn cele al la idealisma subteno de Esperanto. Ili estas konkurencaj komercaj entreprenoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto nur, ĉar ekzistas eblo ricevi profiton per la eldona-

do de Esperantaj publikigaĵoj. Plue, kiam presejoj kaj fabrikoj de tajpiloj kaj kompostmaŝinoj trovos, ke ekzistas merkato por aparatoj, kiuj havas la Esperantan alfabeton, ili senhezite provizos la klavarojn de siaj maŝinoj per la bezonataj literoj. Ankaŭ venos la tempo, kiam organizaĵoj kaj oficialaj instancoj, enretiĝinte en la nuntempa lingva kaoso, devas konstati, ke la dungado de armeo da interpretistoj kaj tradukistoj, kaj la perdo de tempo pri lingvaj malfacilaĵoj estas pli multekostaj ol la adopto de la Internacia Lingvo, eĉ se komence estiĝas relative grandaj elspezoj por lingvoinstruado kaj modifo de preseja ekipaĵo. Ĉiu nova inventaĵo kaj procedo havas similan historion.

Jam montriĝis per la malfavoraj recenzoj, kiujn ricevis OEO en la Esperanto-gazetaro, ke ĝi estas kondamnita al malsukceso kaj neniam ŝancelos la Fundamenton. Povas esti, ke la propono de Lienhardt allogos kelkajn malkontentulojn, kiuj ĉiam ekzistas en Esperantujo, sed neniam okazos amasa akcepto de OEO. Ĉu ni, do, kun rideto kaj mansvingo malokupiĝu pri tiu reformprojekto? Ne! Tute male, estas necese energie kontraŭagi. Se estontece okazos oficiala pritrakto de la internacilingva demando por eventuale elekti la internacian lingvon, la aŭdigo de eĉ unu febla sed misharmonia voĉo inter la esperantistoj, proponanta reformojn, sufiĉos por estigi dubojn pri la taŭgeco de Esperanto. Estas nekredeble, ke post jarcento da mortnaskintaj reformprojektoj, ankoraŭ troviĝas homoj, kies horizonto estas tiel malvasta, ke ili ne komprenas, aŭ ne volas kompreni, ke la fina oficiala decido pri alprenado de internacia lingvo ne baziĝos sur ties ortografiaj trajtoj, sed dependos de sociopolitikaj faktoroj.

Post la naskiĝo de Esperanto aperis pluraj "plibonigitaj" kaj "pli perfektaj" planlingvaj skemoj, sed nek la publiko nek oficialaj instancoj montris pli da interesiĝo pri ili, kaj tute mankis deziro subteni tiujn novajn internaciajn lingvojn. Eĉ unu el ili ne atingis la nivelon de Esperanto dum komparebla periodo de ekzisto. La kialo de la daŭra ignoro de tiuj lingvoj — kaj estas necese emfazi, ke ili ne havas supersignitajn literojn — estas la rifuzo fare de decidpovaj potencoj en la mondo akcepti internacian lingvon, kiu devigos ilin fordoni la privilegian pozicion de politika, ekonomia kaj kultura supereco, kiun ili havas pro la uzo de iliaj naciaj lingvoj en internaciaj rilatoj. Kiu konas la historion de

la klopodoj prezenti Esperanton al la Ligo de Nacioj dum la 1920-aj jaroj, memoros, ke la afero fiaskis, ne pro iaj difektoj en Esperanto mem - ne sonis eĉ unu pepo pri supersignoj - sed pro la akra kontraŭstaro de france parolantaj lingvaj ŝovinistoj. Hodiaŭ similaj socipolitikaj sintenoj malantaŭ la kulisoj en UNO kaj UNESKO silentigas ĉiujn proponojn solvi la Babel-problemon per internacia lingvo.

Revenante al la enkondukaj frazoj de tiu ĉi artikolo, mi demandas min, kio estas la sinteno de AFCE rilate la proponon de Lienhardt reformi la ortografion de Esperanto. La lingvouzo en Esperanto-Fervojisto ja estas tradicie laŭfundamenta; ĝi tute ne montras influon de OEO. Kial, do, okazis, ke la propagando de OEO estis distribuita, kvazaŭ kontrabande, kun la oficiala organo de AFCE? Ĉu la Redakcia Komitato scias pri tio, kaj se jes, ĉu ĝi aprobas tiun agadon? Mia opinio, temas pri etika afero, ĉar kelkaj esperantistoj povas erare tiri la konkludon, ke AFCE aŭ kelkaj el ĝiaj funkciuloj apogas la klopodojn de Lienhardt modifi Esperanton.

# KOMPLETIGE AL LA LERNOLIBRO

Bernard GOLDEN

## ENHAVTABELO

Antaŭparolo.....	1
Neelĉerpebla fonto de eraroj.....	3
Kiel <u>ne</u> ĝustigi erarojn.....	7
Ĉu vi Ĥodas en Esperanto?.....	11
La transitiveco de verboj en Esperanto.....	13
"Ŝpruci" - Ĉu transitiva aŭ netransitiva?.....	18
La problemo de akuzativa akordo.....	19
La sisterona akuzativo.....	21
La kialo de la superflua uzo de la akuzativa kazo.....	23
La signifo de la adjektivoj kun la prefikso "trans".....	25
La kazo post "eskapi".....	27
La malĝustaj verboj "elmergiĝi" kaj "submergiĝi".....	29
"Polucii", "Poluci" aŭ "Polui"? .....	31
Lingva malekonomio en Esperanto: la kazo de tri sinonimoj - "raportisto", "riportisto", "reportero".....	34
Ankoraŭ kelkaj komentoj pri "komunumo".....	36
Erarvagante en la verda "graf"-lando.....	39
Por la falsajn amikojn!.....	42
Pri la erara uzo de "absolvi" en Esperanto.....?	45
La misuzo de "respektive" en Esperanto.....	46
"D-rino" aŭ "d-ino"?.....	48
La traduko de <u>processor</u> en Esperanto.....	50
Rimarkoj pri fuĝa stilo en Esperanto.....	52
Kiu uzas "slavismojn" en Esperanto?.....	54
Ankoraŭ unu malsano de Esperanto - la latinismo.....	57
Kontribuaĵo al la dialektologio de Esperanto: la estiĝo de "hungarsperanto".....	63
Ĉu fervojistoj celas reformi Esperanton?.....	67
Enhavitabelo.....	70